



NORDHUNGARIA INFORMO


*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*

Oktoebro – Novembro - Decembro 2012-a

7a jarkolekto nro 86-88

Enhavo

Oktobero-novembro-decembro	3
Proverboj, saĝdiroj, popolaj observoj pri la aŭtuno	5
Memorindaj tagoj, Mondo Tagoj	6
La skribilujo	9
Festo de esperantistoj estantaj pli ol 50 jare	11
Estrarelekta kunveno ĉe Hungara Esperanto-Asocio	12
Gasto niarevua estas Valentin Melnikov	12
Gratulo	16
Fundamenta Leĝo de Hungario	16
Florkronado	16
Ĉu vi aŭdis jam, ke	16
Leterkesto	17
Trilanda konferenco	18
Ĉe la Interlingvistikaj Studoj de UAM komenciĝis la 15-a studjaro	18
Ŝercoj	20
Enigmoj	21
Esperanto-Ponto en Bydgoszcz en Pollando	21
Glaso de vereco	21
Historio de la Miŝkolc-urba Esperanto - Movado en 2012	24
Albana vivo	27
El Albanaj Rakontoj	27
Centjariĝo	30
Albanio en la jaroj 1941-1944	33
La 79-a Itala Kongreso de Esperanto	33
Nova esperantlingva verko	35
Ni funebras	35
Kun granda malĝojo ni informas, ke la 18.11.2012 forpasis nia Amiko	36
Budapeŝta ekzameno	38
Bondeziroj	46



Oktobro-novembro-decembro

Karaj legantoj!

Alvene decembro; la lasta monato de la jaro, ni vivas per tiu ebleco, ke trarigardu la lastajn tri monatojn, el vidpunktoj de la homo vivanta en, por kaj el la naturo. La malnovaj hungaraj kalendaroj spegulas aliajn nomiĝojn de la monatoj de la jaro, ekzemple oktobro nomitas **monato de semanto**, novembro estas **monato de forpaso** kaj decembro estas **monato de sonĝo**. Estante urbanoj jam foriĝintaj el la naturo, jam delonge ni forĝesis pri tiuj nomoj, do ni devas revigligi, ripeti, rememori tiujn sciojn.

Kiu frue semas, tiu frue povos rikolti. Tenas la hungara popola saĝeco pri la terkulturista observaĵo, ĉar tiu scio baziĝas sur miljaraj rutinoj, ekzercoj pri la terkulturado. La avantaĝo de la aŭtuna semado pleje montriĝas dum la printempiĝo. La tiel nomitaj travintradaj kreskaĵoj semitaj antaŭ alveno de la vintro eĉ antaŭ 2-3 semajnojn pli frue komencas evolui en la bone antaŭpreparita tero, ol la printempe semitaj kaj je la varmego alvenanta - jam kutime - je fino de aprilo kaj komence de majo, ili jam bone kreskas, kaj rikolteblas. Ja, vintre ĝiaj dumvivaj procesoj malrapidiĝas kaj nur post la travintrado komencas denove rapidiĝi. Malnova sperto estas ankaŭ tio, ke vintre la antaŭsemitaj kreskaĵoj bone ripozas sub la neĝo, sed seka-vintre la bona vintrado de semoj damaĝiĝos ĉar nesavante la semitaĵo eble defrostiĝos, suferos damaĝadon pro la frostoj. Ĝuste por eviti ĉi tiun ŝancon

oportunas tiel semi la kreskaĵojn, ke tiuj fortiĝu antaŭ alveno de la vintro aŭ tute ne havu ŝancon por ĝermi antaŭ printempo. Mi aŭdis pri tio, ke pro la damaĝiĝo pro la defrostiĝo de la hordeo, el ties semoj estiĝis verdaĵsterko en la tutaj cent hektaroj de grundo, pro kio la post ĝi semita ruĝa flora trifolio donis rekordan kvantan kaj rekordan kvalitan produktaĵon. Kvankam tio bone profitis, sed hordeo ne kreskis por kio la agro-kooperativo havis produktigan kontrakton.

Krom la semoj de aŭtuna tritiko, hordeo, eĉ ankaŭ de la kolzo semitaj komence de oktobro, oni kutimas semi ankaŭ la semojn de travintradaj legomoj. Dum mia vojaĝo en Francujo (2009) mi aŭdis pri specoj de laktuko semitaj aŭtune, kiuj rikolteblaj estas dumvintre. Tiuj havas multegajn vitaminojn kaj utilajn mineralajn salojn, do tre utilas ilia kultivado krom la profitodona ŝanco.

Nia lande la legomosemoj semitaj oktobre kaj novembre pro la aŭtunaj pluvoj dikiĝas en la tero kaj je fino de la vintro ili jam ĝermos. La semadon de la travintradaj legomoj ne estas bona lasi al printempo, ĉar la printempa kaprica vetero ne lasos sufiĉe da tempo al la grundon antaŭpreparaj laboroj. La travintradajn legomosemojn oni devas tiel semi, ke tiuj tutcerte ne ĝermu antaŭ vintro. Do, la semanto devas atendi ĝis la temperaturo estos daŭre 4-5 Celsius gradoj, sed la grundo estas ankoraŭ tiam prilaborebla. La risko en tiu semado estas, ke en iu neatendita varmiĝo de la vetero jam ankoraŭ aŭtune ekiras la ĝermado kaj tiam la kreskaĵoj jam ne havos sufiĉe da tempo evolui tiom multe, ke ili povu bone toleri la duran vintron.

Al aŭtunaj semadoj la plej taŭgas: karoto, petroselo, pizo, spinaco, okzalo kaj papavo. La cepon oni devas semi: je fino de somero, la ajlon de mezo de septembro ĝis mezo de oktobro, la poreon per semado ĝis septembro-mezo, sed ties plantado okazu oktobre. La spinaco kaj la krispa brasiko estas semebla ĝis komenco de oktobro, la papavo ĝis mezo de oktobro.

Novembron ni nomas ankaŭ kiel fino de aŭtuno kaj monato de forpaso. Ja, forpasas je tiam la someraj floroj, subfalas la milkoloraj folioj de arbustoj, arboj. Novembro estas la lasta monato de la laboroj antaŭpreparantaj la teron antaŭ la vintro. Bona pensado estas, se dum aŭtuno ni preparas nian organismon (nian imunsistemon) al la vintro; manĝante multajn krudajn fruktojn kaj legomojn.

Decembro estas monato de la ripozo - post la tutjara laborado en la naturo - parte de la homo, parte de la naturo ĝi estas la komenca monato de la sonĝo. Ĝi estas monato de ankaŭ la jarfinaj festadoj, ekzemple de kristnasko sur la kristanaj teritorioj.

Adri Pásztor



Proverboj, saĝdiroj, popolaj observoj pri la aŭtuno

La proverboj, saĝdiroj ofte uzataj saĝaj esprimoj estas koncernaj ion, iun. Vidu kelkajn el ili:

Sen humora, kia estas la pluva aŭtuno. **Milda**, kiel la aŭtuna muŝo estas. **Malkonstanta**, kia la aŭtuna vetero estas. **Printempa vento vojon sekigas, aŭtuna pluvado faras inundon**.

Se tagon de Ĉiuj Sanktuloj (1. novembro) pluvas, milda vetero okazos vintre. Se (Martentage la 11an de novembro) ansero de Marteno iras sur glacio, kristnaske ĝi iros en koto. Se dum la nomtago de Katarinoj; (la 25an de novembro) la ŝuoj klakas sur la grundo (malmolas la grundo pro la frosto) kristnaske pluvos (pro mildiĝo de la vetero, sed la aŭguro pravos ankaŭ returne).

Adri Pásztor

Landa Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto - Malfermita tago - Eŭropa Tago de la Lingvoj la 26a de septembro kaj kiu forrestis el ĝia programo

Laŭ la programo ricevita de la Landa Fremdlingva Biblioteko Budapeŝto, dum la Malfermita tago de Fremdlingva Biblioteko ne okazis Esperanto lingvaj prelegoj kaj ekspozicio okaze de la 125a datreveno de ekzisto de Esperanto.

Sed anstataŭi la mankojn, okazis prelegoj poste, kiujn kaj la ĉef-direktorino de la menciita biblioteko, kaj la esperantista publiko akceptis bonkore. La eventoj okazis plensukcese, nur mankis la forrestinta ekspozicio de la esperanto-lingva literaturo, nefarita de la nova bibliotekistino de la Kolektaĵo Fajsz. Ni esperas, ke enestonte ŝi faros ekspoziciojn per ili riĉigante la vivon de la Fremdlingva Biblioteko.

Jen bildoj pri partoj de la publiko. La fotojn sendis Johano Nagy; ekonomia vicprezidanto de HEA.



Demandoj-respondoj de priakcepta ekzameno

Mi eksciis, ke ie en Hungario okazis enira ekzameno, dum kiu la demandito atingis 0 punktojn pro liaj respondoj, tamen li gajnis la anoncitan oficejan lokon, li iĝis dungito, ja liaj respondoj senescepte pravon havaj estis. Konvinkiĝu pri ili:

/1/ En kiu interbatalo mortis Napoleono?

--- En lia lasta.

/2/ Kie estis subskribita la Deklaro de la Sendependiĝo?

- Sur malsupro de la folio.
- /3/ Kio estas la plej ĉefa kaŭzo de la eksgeedziĝoj?
- La geedzeco.
- /4/ Kio estas la plej ĉefa kaŭzo de la sensukceso?
- La provado.
- /5/ Kiujn vi ne manĝis al matenmanĝo?
- Tagmanĝon kaj vespermanĝon.
- /6/ Kio aspektas kiel duono da pomo?
- La alia duono de la pomo.
- /7/ Kia estos la ruĝa ŝtono, se ni ĵetos ĝin en la bluan maron?
- Malseka.
- /8/ Kiel toleras iu homo la sendormon dum 8 tagoj?
- Simple, li dormas nokte.
- /9/ Al kio vi povas konkludi, se en via maldekstra mano estas 3 pomoj kaj 4 oranĝoj, kaj dekstra mane estas 4 pomoj kaj 3 oranĝoj?
- Mi havas grandegajn mankavojn.
- /10/ Se 8 masonistoj konstruis la muron dum 10 horoj, kiom da horoj bezonos 4 masonistoj?
- Neniom, ja la muro jam pretiĝis.
- /La Hungarlingvan tekston de s-ro Stefano Sutka esperantigis s-ino Adri Pásztor/

Memorindaj tagoj, Mondo Tagoj

1. oktobro 2012

Tiam, dum Mondotago de la Muziko en la Landa Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto al la vizitantoj kaj gastoj oni donis renkontiĝ-eblecon kun mondo de la 20. jarcento-komencaj muzik-artoformoj francaj kaj hungara. Vivojn kaj artojn de Claude Debussy kaj Zoltan Kodály - ĉi tiuj elstaraj artistoj de la epoko - kaj iliajn reciprokajn efikojn sur artojn de unu al la alia, prezentis en sia prelego Andrea Darvaši. El iliaj muzikoj faris prezentadon la kantoartistino Katarina Szűcs kaj la pianartistino Katarina Frideczky.

17. oktobro

Tiu estas „Mondotago de Luktado kontraŭ la Malriĉeco”. La Unuiĝintaj Nacioj decidis pri tiu tago en decembro de 2012. „La malhavulo mankhavas multĉion, sed por la monavidulo mankas ĉio.” - Ĉi tiu filozofio devenis de la sklavo-verkisto, kaj aktoro: Publilius Syrus deveninta el Sirio, kiu vivis antaŭ Kristo, en tempo de Lucius Annaeus Seneca.

18. oktobro

Okaze de 10-a foje la Tago de la Hungara Pentrado, tutlande en 50 lokoj estis aranĝitaj ekspozicioj, okazis paroladoj, publikaj atelieroj ĝis la 20-a de oktobro.

21. oktobro

Tiu tago estis la 100-a datreveno de naskiĝo de Georgo Ŝolti (1912-1997); hungara dirigento kaj pianartisto.

31. oktobro

Ĉi tiu tago estas 100-a datreveno de naskiĝo de Johano Szentágotai (Senta:gotai:1912-1994) hungara anatomo premiita per premio-Kossuth.

<http://eo.wikipedia.org/wiki/JanosSzentagotai>

2. novembro

En Hungario ĝi estas Tago de la Mortintoj. Tiutage ankaŭ tiu iras en la tombejon/tombejojn al tombo/tomboj de siaj geamatoj, kiu ne kutimas iri aliam tien pro iu ajn kaŭzo. Ja niaj geamatoj ne pasas for senpure. Ili vivas plu en nia koro. Vane flugas for la jaroj, songoj, senbareble ni apartenas unu al la alia, kaj rememoras ilin. Ni do portas sur ilian tombon florojn de ili iam ŝatatajn, lumigas kandelojn je ilia memoro.

9. novembro

Tago de la Inventistoj. Ĉu vi scias, ke inter la plej famaj inventintoj de la mondo estas 92 hungaraj?

27. novembro

Tiu ĉi tago estas Memortago de Fondigo de la Nobel-premio. Ĉu vi scias, ke en 2012; la Eŭropa Unio ricevis la Nobel-premion pri paco?

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Nobel-premio>

2. decembro

Tiu ĉi tago estas Memortago de ĉesigo de la sklaveco. Ĉu vi scias, ke la sklaveco estas historio de tiuj homoj, kiuj estis senhavigitaj de iliaj: persona libereco, homaj rajtoj kaj estis venditaj laŭ siaj laborkapabloj?

Ĉu vi scias, ke antaŭ la Civila milito en 1860, en Usono 4 milionoj negraj kaj mulataj sklavoj atendis la liberigon?

15.decembro

Ĉu vi scias, ke la 15-an de decembro en 1859 antaŭ 153 jaroj naskiĝis D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, kiu per kreo de la lingvo-Esperanto, kreis „ponton” inter la homoj por senbare kompreni unu la alian? Ĉi tiu internacia lingvo-ponto ĉi-jare estas 125. jara!

16. decembro

Tiu tago estas Tago de la Hungaraj Ĥorusoj.

21. decembro

Tiu ĉi tago estas Tago de la Apostolo Sankta (nekredema) Tomaso. Krome ĝi estas tempopunkto de la vintra solstico kaj komenco de la astronomia vintro.

25-26.decembro



Tiuj estas tagoj de la Kristnasko. (religia festo de kristanoj.)

31. decembro

Elekto de papo Silvestro okazis la 31-an de decembro en jaro 314, kaj fino de lia regado estis la 31-a de decembro en jaro 335. Dum lia funkcio okazis konstruadoj de temploj. Tiutempe konstruitis la Sankta Johano katedralo de Romo. Lian tagon oni festas la 31-an de decembro kaj post ĉi tiu tago sekviĝas la unua tago de la Novjaro.

La hungarlingvan tekston de Adri Pásztor, esperantigis Ladislao Pásztor

SinJORino Adri Pásztor

La skribilujo

Ekde mezo de aŭgusto malfacila estas trovi tempon kiam malplenas la paperbutikoj miaurbe. Tiam aĉetadas la homoj la diversajn varojn al la nova studjara komenco. Mi serĉis la vendejon de paperaĵoj ĉirkaŭ tagmezo, kaj mi sukcesis eltrovi, ke ne estu tiam tie multaj homoj. Do feliĉe mi evitis la tiean tumulton.

Mi libere serĉadis inter la leterpaperoj kun kovertoj, por trovi la sopiratan, kio multe similas al la iamaj leterpaperoj ricevitaj de sinjoro Michal Kucin, la eksa sekretario de la Orienta-slovakia Esperanto-Klubo en Košice. Li donacis al mia ĉiu naskiĝtago stokon da interesaj kaj belegaj leterpaperoj kun kovertoj. Ilin mi uzis skribi leteron al li kaj liaj familianoj krome al miaj aliaj elstaraj geamikoj en Esperantio.

Dum mia serĉado preskaŭ eksplodis en la butikon blonda knabeto kun lia simile blonda patrinjo. Ili serĉadis inter la varoj kaj poste aĉetis ĉion necesan al komenco de la unua klasa studjaro en la bazlernejo. La patrino portis la varojn al la kaso por pagi, kiam la vendejan montrofenestron dume rigardanta knabeto ekkris:

- Panjo! Tiun skribilujon en la montrofenestro mi tre ŝatus havi! Ĝi okulumis sur min! Aĉetu ankaŭ ĝin!

La panjo surprizite turnis sin al la fileto, kaj notis:

- Ne parolu stultaĵon! La skribilujoj ne kutimas okulsigni!

- Panjo, vere ne la skribilujo palpebrumis sur min, sed tiu knabo kiu pentrita estas

sur ĝia malsupro. Mi tre ŝatus havi ankaŭ tiun skribilujon, aĉetu al mi, mi petas.

La patrino aliris la montrofenestron de la butiko por rigardi, pri kio parolas la infano. Poste klarige turnis sin al ŝia fileto:

- Mi bedaŭras, sed ni ne povas jam aĉeti ankaŭ ĝin, ĉar ĉi varoj multe plie kostis ol mi kalkulis. Vi ricevos la skribilujon de via frato Ludoviko.

- Sed, panjo, la skribilujo de Ludoviĉjo estas el plastiko farita kaj jam ŝiriĝis. Ĉi estas el ligno, ĝi estos bona pli longan tempon.

- Ne eblas, mi ne havas tiom multe da mono – diris la panjo, poste ŝi daŭrigis:

ni devas aĉeti vindotukojn al via frateto Emeriĉjo, ni ne povos aĉeti ĉi skribilujon - diris kaj inklinis foriri. Sed la infano kun larmoplenaj okuloj petegi komencis:

- ni devas aĉeti vindotukojn al via frateto Emeriko, ni ne povos aĉeti la ujon de skribiloj - diris kaj inklinis foriĝi. Sed la infano kun larmoplenaj okuloj petegi komencis:

- Panjo, se vi metus mian infanĝardenan viŝtukon kiel vindotukon sub mian frateton, ĝin vi devas nur lavi, ĝi povos esti uzebla pli longdaŭre ol la papera vindotuko. Mi ege ŝatus la skribilujon! Panjo, mi petas! La panjo malgaje, tamen strikte turnis sin neante al la knabeto.

- Ne eblas. Mi diris jam.

- Sed panjo, por ke vi tamen aĉetu ĝin kio devus okazi? Ĉu mirakloj ne ekzistas jam? Ĉu mirakloj okazas nur en la fabeloj?

- Aŭdinte ĉi parolon, ekbedaŭre la infanon alparolis ilin la kasistino:

- Se la vendejo malaltigus ties prezon - sinjorino - ĉu vi aĉetus ĝin?

La patrino de infano mire rigardis la kasistinon. Al la okazintaĵo ekatentis la estro de la paper-vendejo kaj turnis sin al la aĉetantoj:

- Kiom vi povus pagi pro la varo? Ĉu duonon de la prezo vi povus?

- La sinjorino surpriziĝis, poste tamen neis, sed dume denove alparolis ŝin la estro de vendejo:

- Sinjorino la de vi aĉetitaj varoj, estas fiksitaj prezaj, sed prezon de la skribilujo, mi povas mildigi. Nu, ĉu pro la duona prezo vi povus aĉeti ĝin al via infano, por ke la unuajn paŝojn je lia lerneja komenco li faru ne per amara seniluziiĝo? Ja li havos multe dum lia vivo! Vi scias pri tio! La virino forte pensadis, luktis kun si mem, poste tamen cedis:

- Bone, la duonprezon mi povas pagi, sed ne plu. Bonvolu transpreni la prezon - diris kaj transdonis la monon. La vendejestro elprenis de la montrofenestro la skribilujon kaj en etsaketon metante ĝin transdonis al la blonda knabeto:

- Prenu kaj portu karuleto ĉi skribilujon! Portu ĝin feliĉon al vi!

La infaneto ruĝe pro la ĝojo dankis la ujon de skribiloj kaj foririnte promesis tre bone lerni en la lernejo por danki sufiĉe la bonvolon. Poste ili adiaŭis kaj foriris. La butikisto malpleniĝis.

Post ilia foriro la vendejo estro portis al la kaso sian monujon kaj pagis la mankantan monon al la plena kosto de la skribilujo. Dorson turniĝante rimarkis la vendeja estro, ke mi ĉeestis la okazintaĵojn. Li klarige almetis:

- Mi ne rajtis prezon moderigi, sed mi volis helpi. Mirakloj bezonatis ĉiam. Necesis montri ankaŭ nun, ke ili vidu: mirakloj povas okazi ankaŭ nun en la reala mondo, ne nur en la fabeloj, nur oni devas forte kredi ilin. Povas esti, ke iam ĵus li fortigos la kredon, li transdonos miraklon al aliuloj, kiel mi pludonis nun la miraklon iam donacitan de iu nekonatulo por mi.

Festo de esperantistoj estantaj pli ol 50 jare

„Kara Adri, mi vidis, ke vi sendis informon pri via kvinekjariĝo kiel esperantisto. Sed ne signis, ke vi volas ĉeesti en la memorkunsido. Tial mi miris ke vi ne venis, poste mi komprenis ties kaŭzon la rompitan manon. Jubileantoj ni ĉeestis nur 6-ope: Petro Tihanyi, doktoroj Georgo Nanovszky, Emeriko Ferenczi, Endre Dudich, Ludoviko Molnár, Aŭrelia Ponori (Tewrewk) Török. Same ne ĉeestis ankaŭ samideanino Eva Farkaš-Tatár kaj tiuj kiuj ne sciis pri la aranĝaĵo. Krom ni estis ankoraŭ 9 ne jubileantoj. Ĉiuj jubileantoj rakontis mallonge; kiel komenciĝis sia esperantistiĝo. Poste la ekonomia vicprezidanto de HEA: Johano Nagy transdonis ornamitajn memordiplomojn kiel atestilojn, sed mi kaj ankaŭ aliulo ne ricevis, ĉar pri ni li malfrue informiĝis. Sed Johano Nagy promesis, ke ĉiuj kompetentuloj ricevos la memordiplomon dum la 11-a de novembro, okaze de la asemblea kunsido. Samideano Lajoš Molnár disdonis al la festantoj mapon ene kun la Fundamenta leĝo de Hungario, dulingve, kion li kaj lia edzino Julia esperantigis. Fine okazis libera babilado dum kio ni konsumis iom da surtabligitaj frandaĵoj.

Amike salutas vin ambaŭ: Petro Tihanyi – doktoro Imre Ferenczy”



Estrarelekta kunveno ĉe Hungara Esperanto-Asocio

Tempo de la kunsido estis; la 11a de novembro 2012a. Ĝia loko: 1146 Budapeŝto, Thököly út 58-60. OKISZ Székház - Károlyi terem. Poŝtadreso: 1146 Budapeŝto, Thököly út 58-60. II/209.



Fotis d-ro György Flendler

„Ni kunvenis ĉirkaŭe 30-35 geesperantistoj el la tuta lando, la aliaj forrestis pro malsano aŭ aliaj kaŭzoj.Kb. El la 28 deputitoj aperis 19. La pli fruaj prezidanto, vicprezidantoj restis (Prezidanto Imre Szabó, vicprezidanto Edit Lindwurm pri ĝeneralaj aferoj, Johano Nagy pri ekonomiaj afergvidoj). En la estraron krome elektitaj estis: Enikő s-ino Sereghy-Zengő kaj Kolomano Romcsek. Elektitaj estis ankaŭ la diversaj komitatoj... – Anna Besenyei”

Nome de la EAR „Király Lajos”, en interesoj de la 125 jara Esperanto kaj la hungaria esperantista movado, mi deziras sukcesplenan kunlaboradon ne nur inter la estraranoj kaj la landaj pliaj geesperantistoj, sed ankaŭ kun la eksterlandaj gesamideanoj:

Adri Pásztor

Gasto niarevua estas Valentin Melnikov

Karaj legantoj!

Atingante la jarfinon, mi kolektis novaĵojn, ĝis nun ne legitajn delikataĵojn al vi por amuzi. Antaŭ ol pluri, bonvolu konatiĝi kun rusa esperantista poeto, kiu volonte sendis al ni liajn verkojn por prezenti sin. Liaj poemoj aperantaj ĉi numere - ĝis nun de mi legitaj - temas pri amo, kiu movas la agojn surtere, pro kio indas vivi.

Adri Pásztor

„De V. Melnikov:



Mi naskiĝis en 1957 kaj esperantiĝis en 1982. Laŭdiplome mi estas kemiisto kaj daŭre plu ŝatas kemion, tamen diversaj sortoturnoj devigis min lerni plurajn aferojn – do nun mi laboras kiel komputisto. En Esperantujo oni konas min kiel poeton, tradukiston, recenziston, redakcianon de kelkaj rusiaj E-gazetoj. Miaj poemoj kaj recenzoj aperis ankaŭ en Esperanto (UEA), Hungara vivo, Monato, Literatura foiro, Litova stelo k.a. Libroforme estis eldonitaj la tradukoj: rusa erotika poemo «Kojonov Luĉjo» (1995) kaj novelo de Lev Tolstoj «La morto de Ivan Iljiĉ» (1997); pluraj versaĵoj estis presitaj en kolektivaj poemaroj «La birdo Gamajun» (1989), «Lena...» (1998), «Moskvaro» (1998) kaj «Moskvaj sonoriloj» (2007). Tamen mia plej grava kontribuo por literaturo estas, certe, la traduko de fama versromano de Aleksandr Puŝkin «Eŭgeno Onegin», eldonita en 2005 kiel n-ro 40 de la serio «Oriento-Okcidento». Mi verkis grandan artikolon pri Esperanto en la ruslingva «Porinfana enciklopedio» (1998, eldonkvanto 100 000) kaj opinias tion tre grava afero por propagando de nia lingvo inter saĝaj, scivolemaj kaj progresemaj gejunuloj, kiuj dominos en la vivo post jardeko.

Ekde lernejoj jaroj mi multon aŭdis pri Esperanto kaj revis lerni ĝin. Kial? Por almenaŭ unu fremdan lingvon ekposedi perfekte – ja rilate la naciajn lingvojn tio ne eblas. Tamen mi neniel povis trovi lernolibron, nek adreson de iu klubo (nun mi komprenas – kial...). Nur en 1982 bonŝance aperis la kurso de Boris Kolker en la revuo Ĥimija i Ĵiznj, la plej liberpensema tiutempe en Sovetio. Mi kaptis ĝin kaj jam nenio povis deŝiri min de Esperanto.

Iĝinte esperantisto mi kvazaŭ naskiĝis duafoje. Nenie aliloke eblas trovi tiom bonajn interhomajn rilatojn, nenie eblas vivi tiom interese. La amikeca etoso helpas evoluigi en ĉiu homo kapablojn, pri kiuj li mem antaŭe eĉ ne suspektis. Dum tiuj jaroj kelkfoje ŝanĝiĝis mia rolo en Esperantujo. Finfine mi trovis min en la esperanta poezio kaj kulturo, kvankam certe ne eblas tute ignori la «movadon».

Ni ne ĝisvivis la «finan venkon» de Esperanto, sed ni devas prepari nian lingvon, ke tiu venko iĝu ebla. Por tio gravas evoluigi nian kulturon, ke neniu povu diri, ke Esperanto estas «malviva lingvo». La strategio estis bone determinita en Raŭma, Szeged kaj Prago, do – ni agu!

Mi sentas la devon helpi tiujn, kiuj venis al Esperanto post mi. Mi elektis la taskon «informejo+urĝa helpo»: se iu havas problemon rilate Esperanton kaj ne scias la solvon – tiu turnu sin al mi. Se mi ne povos helpi mem, mi konsilos pri la helponto.

Iuj malŝatas mian karakteron, mian manieron senkompate kritiki ĉion kritikendan, eĉ sarkasme moki, se la kritiko ne helpas. Mi ĉiam nomas la aĉulon aĉulo. Jes, mi ne estas diplomato, ne kapablas flati kaj hipokriti. Diplomatoj vivas pli trankvile kaj pli sate. Tamen,

Ne ŝatas mi certecon plenesatan,
prefere – malaperu sinregad',
domaĝas mi honeston forgesatan
kaj kalumnion nun en pietat'.
(V.Visockij, trad. N. Lozgaĉev)

Mi batalas kontraŭ maljusto, mi abomenas demagogojn, fiaferistojn, mensogulojn kaj arogajn malkapablulojn. Mi tre malŝatas vantan babiladon pri ies nobla deveno (nun tio iĝis modo, kaj oni

amase fanfaronas pri siaj aristokrataj radikoj – plejparte falsaj), «pureco de sango» ktp. Lasu tion al hundoj kaj ĉevaloj, sed homo rajtas fieri nur pro tio, kion li atingis mem!

Mi ne ŝanĝas mian mondkoncepton konforme al reganta ideologio: mi neniam estis komunisto kaj neniam kredis/os je «dio». Mense forta homo adekvate perceptas la mondon kaj mem responsas pri ĉiu sia ago; la sana konscienco ne bezonas lambastonojn el «sanktaj» dogmoj. Mi estimas nur saĝajn homojn kun pura konscienco – ĉu iu riproĉos min pro tio?

Valentin Melnikov”

Valentin Melnikov

Aŭtuna sopiro

Serĉas mi, dronante en rutin’,
por tradukoj vortojn plej precizajn,
sed konstante rememoras vin
kaj okulojn viajn verde-grizajn.

Mi vin vidas foje nur dum jar’:
loĝas vi de la ĉefurbo fore,
en urbeto apud varma mar’
vi instruas verve kaj fervore.

Malproksimas vi. Kaj nur imag’
restas min konsoli sen forgeso;
rememoroj pri l’ pasinta tag’,
pri sinceraj ĵuroj kaj konfeso.

Trompojn kaj maljustojn en proksim’
vidis mi. Kaj perdus eĉ esperon,
sed en mia – laca jam – anim’
vi sukcesis vekti primaveron.

Dolĉo kaj doloro... Kaj sopir’.
Forgeseblas ĉiuj miaj plagoj...
Kaj hodiaŭ trafas mia ir’
lokojn de someraj niaj vagoj.

La someron sekvis la aŭtun’,
ni, nature, jam ne plu turistas.
Pluvaj kugloj frapas arbojn nun,
la malplena tendarejo tristas.

Solas mi dum tago kaj vesper’,
nia renkontiĝo svage foras...
Kaj ĉirkaŭe regas misveter’ –
ĉu pri ni denove nokto ploras?...

Vento furiozas kun obstin’,
kaj aŭdiĝas en fajfad’ kaj knaro:
“Vi ne plu, ne plu revidos ŝin!”
Morgaŭ – ne. Sed jes ja – dum la jaro!

1989

(2a premio de “Muzo-90”)

Gratulo

La Miskolc urba Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” gratulas la geedzojn:

Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia pro la ricevita premio DEGUĈI, kaj deziras bonan sanon por plulabori en intereso de Esperanto!

SinJORino Adri Pásztor

Fundamenta Leĝo de Hungario

La Fundamenta Leĝo de Hungario estas esperantigita de geedzoj doktoroj Molnár, reviziita de d-ro Endre Dudich kaj Leo de Coman. La dulingvan tekston volonte sendos al vi doktoro Ludoviko Molnár. Lia atingebleco estas: <ludoviko@t-online.hu>

Florkronado

La 6an de oktobro 2012a okazis la florkronado de busto de d-ro Kolomano Kalocsay en urbo Abaújszántó, kaj interparolado en la loka kulturdomo pri la 125a jardatreveno de ekzisto de Esperanto. Folkloris krom la reprezentanto de la Kulturdomo de Abaújszántó ankaŭ sinjoro László Pásztor de la Esperanto-Amika Rondo „Király, Lajos”. La eventon partoprenis entute 5 homoj. Inter ili ankaŭ la eksa urbestro Soltész, Zoltán [Zolta:n Ŝolte:s], kiu multe apogis kaj subtenis en Abaújszántó la elformojn de la Kalocsay memorlokoj.



La bildon fotis kaj raportis s-ino Adri Pásztor

Ĉu vi aŭdis jam, ke ...

La plej proksiman parencon de la nuna homo; **la homon de la Neander-valo** revivigis iu esplorista grupo komisie de BBC (Brita Radio-Televiza Akcia Kompanio)? Kia estis tiu homo? Rigardu bildon pri tiu ĉe: <http://richpoi.com/cikkek/tudomany/eletre-keltette-a-neandervolgyi-embert-egy-kutatocsoport.html>

Unu miliono da jaroj necesas al malkombiniĝo de la vitro. Tio signifas, ke ĝi preskaŭ neniam estiĝos foruzita kaj senbare estas denove aplikebla, utiligebla.

La oro ne rustiĝas. Ankaŭ post 3000 jaroj ĝi restos orobjekto kio estis iam enterigita.

Se vi estas maldekstramana, tiukaze vi maĉas maldekstraflanke. Alikaze vi maĉas dekstraflanke.

Uzon de iloj konstatis iu esplorista grupo ĉe kakatuo sed tiel, ke la birdo unue **pretigis la necesan ilon** (lignospliton eligis ĝi der sia kaĝmuro), poste aplikis ĝin por atingi la nutraĵon estinta ĝi ekster sia kaĝo.

En la nialandan Zoo-parkon de urbo Nyíregyháza alvenis du tigroj malajaj. Ili estas blankaj, kiuj ne estas mutacioj de la ordinara koloraj, sed nur alikoloraj ekzemploj de ilia genro-specio. Ilia felto estas kremkolora kun ĉokoladobrunaj strioj. El tiu specio vivas en la mondo ĉ. 250 ekzempleroj. El tiuj „blankaj tigroj” la unua estis kaptita en 1951 en Meza – Hindujo. Bedaŭrindas tio, ke ili vivas en mallibereco, sed gardante ilin en la Zooĝardenoj, certas, ke jam ne formortos ilia speciala specio - mi legis pri tio en la Reta Pozitiva Novaĵgazeto eldonita en Hungarujo.

Amerikaj scienculoj malkaŝis mikrobojn sub glacio de salakva lago sur la Antarkto. Oni supozas, ke la plujaj esplor-rezultoj eble pruvos, ke *povas ekzisti vivo inter similaj tre ekstremaj cirkonstancoj sur aliaj frostiĝintaj planedoj.*(Richpol-novaĵoj, novembro 2012 //<http://richpoi.com/cikkek/tudomany/mikrobakat-talaltak-egy-fagyott-antarktisi-toban.html>)

Adri Pásztor

Leterkesto

Kapelo de Sikstus

En la kapelo de Sikstus en la baziliko Sankta Petro en la Vatikano, kie oni kutimas elekti la papojn, troveblas ties plafona fresko, la nun 500 jara kreaĵo de Mihelangelo, estas unu plej konata verko de la mondo, ties 540 m² teritorio kiel unuforma fresko estas la unika tabelo de rolantoj kaj eventoj de la Malnova Testamento. En epoko de la Itala Renesanco, inter 1508 kaj 1512 estiĝanta kreaĵo konsistas el apenaŭ nenombreblaj elementoj.

Edison

En 1847 naskiĝis kaj en 1931 mortis: Thomas Alva Edison; inventisto, al kies nomo 1093 patentajoj ligiĝas.

La unuaj telefoncentraloj

Antaŭ 120 jaroj malfermiĝis la unuaj du telefoncentraloj de Miskolc.

Adri Pásztor

Trilanda konferenco

Ĝi okazis en urbo Břeclav proksime de landlimoj de Slovakio, Aŭstrio kaj Ĉeĥio. Malgraŭ, ke la loko estis loĝita antaŭ miljaroj, la urbo Břeclav solenis nur 170 jarojn de sia proklamo je la urbo, ĝuste dum la konferenco – de 27-a ĝis 30-a septembro 2012..



La programo estis zorgeme preparita kaj tre alloga. Ni el Mladá Boleslav venis nur vendrede, kiam okazis ekskurso al „Lednice“, fama kastelo de gento Liechtenstein, do ni preferis kun gvidanto viziti urbon, muzeon en Liechtensteina palaco kaj apudan sinagogon en la urbo. Ni multe eksciis pri historio de regiono, kiu estas enskribita inter monda heredaĵo jam dum sepdekaj jaroj de la dudeka jarcento. Ĉar ni alvenis malfrue, ni ne havis okazon eĉ spekti prelegojn de S.Chrdle kaj Marček por loka publiko kaj inaŭguron de ekspozicio de aŭstraj artistoj en urba galerio, eĉ bedaŭrinde ne buntan vesperan programon ĵaŭde kaj antaŭtagmezan programon vendrede.

Vendrede je la 17-a horo ni partoprenis konversacian rondeton kun Stano Marček kaj post la vespermanĝo breclava folkloro ensemblo de junularo entuazimigis nin per vervaj spritaj dancoj. Vespera prelego temis pri „Verda stacio“ pere de Paŭlo Kaščák. S-j Marček, Balaž kaj Chrdle prezentis novajn librojn. S-o Chrdle publike sciigis, ke la libro pri Andreo Cseh en traduko de J.Drahotová estos eldonita post la korektado. Margit Turková prelegis pri Karel Havlíček Borovský, ekzilito en Aŭstrio. Poste ni longe en klubejo kantis kun piano.

Sabate antaŭtagmeze okazis jarkunvenoj de tri asocioj aparte. Tuj post la tagmanĝo ni vizitis urban solenaĵon kiun vizitis virtuala imperiestro Francisko Jozefo la Unua. Je la 17-a horo okazis konversacia rondeto kun Pavla Dvořáková. Mi partoprenis kunveno de instruistoj kaj instruantoj. Vespere prelegis Ján Vajs: „Surspure de habanoj en Ĉeĥio, Slovakio kaj Aŭstrio“, mem estante posteulo de habanoj, vere interesa! La ĉeftemo de la vespero estis slovakaj televida filmo pri unika persono de Ján Maliarik, pastro, kiu korespondis kun elstaraj homoj de la mondo, inkluzive de Zamenhof kaj klopodis haltigi unuan mondmiliton. Ĉar la filmo estis tre kortuŝa ni ne plu povis amuziĝi kiel aliaj kaj ni pasis vesperon en babila rondo.

Ankoraŭ dimanĉe okazis bunta programo kun multaj informoj. La plej utila estis por ni prezento de „Lernu.net“ pere de Peter Balaž. Li ankaŭ proponis uzi artikolojn el niaj Legolibretoj kun verda birdo por „Edukado.net“, do mi ĝoje konsentis kaj li tuj ekagis.

Jindřiška Drahotová

Ĉe la Interlingvistikaj Studoj de UAM komenciĝis la 15-a studjaro

Ĉe la Interlingvistikaj Studoj de UAM komenciĝis la 15-a studjaro: la dua studjaro de la 5-a grupo. La persistaj partoprenantoj alvenis el pluraj landoj (Hungario, Svislando, Germanio, Rusio, triopo el Pollando kaj kvaropo el Brazilo). Kiel kutime okazis 4 kursoj: Vera Barandovská analizis kun la grupanoj la pli novajn planlingvajn projektojn enkadre de la interlingvistika kurso. Al la elstara kaj

sindediĉa interlingvistino la grupo gratulis pro ŝia jubileo. István Ertl (redaktoro de Beletra Almanako) prezentis la verkistojn kaj verkojn de la literaturo de la 3a periodo. Michael Farris traktis semantikon kaj morfologion kaj Ilona Koutny okupiĝis pri esperanta sintakso. Post la merkredaj ekzamenoj dum la komuna vespero kelkaj prezentis propran aŭ tradukitan verkon. Semajnfine kiel kutime okazis la kultura renkontiĝo Arkones (jam la 28-a!), al kiu kontribuis la gestudentoj de la Interlingvistikaj Studoj: Ivan Colling (BR) per diskutis la rolon kaj influon de Kartezio, Guilherme Jardim (BR) per prezento de Brazilo, Mirejo Grosjean (CH) interese traktis Afrikon, kie ŝi regule agas kaj Anina Stecay legis sian krimnovelon kaj. Same la ĉeestabntaj instruistoj kontribuis: Zbigniew Galor traktis kulturen ekskludon, Istvan Ertl raportis pri Beletra Almanako kaj Ilona Koutny prelegis pri (ne)eŭropeco de e-o. Ni ĉiuj povis ĝui la aliajn abundajn kaj interesajn programojn.

Prof. Ilona Koutny, akademiano, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Novajoj el Ĉinio

/1/ En la 7-a de oktobro okazis en Hongkongo la unua aŭkcio organizita de la Ĉina Guardian (Hongkongo) Internacia Aŭkcia Limigita Kompanio en la kuranta jaro. Multaj eminentaj kolektantoj ĉindevenaj venis el diversaj lokoj al Hongkongo por fari aŭkcian oferton. Post dekoj da plipropono, la pentraĵa albumo kun la titolo "Kolorigita Pejzaĝo" de Qi Baishi estis vendita je la alta prezo de 46 milionoj da Hongkongaj dolaroj.

Qi Baishi (1864-1957), naskita en la provinco Hunan en centra Ĉinio, estis majstro de la ĉinstila pentrado, tradicia kaligrafio kaj sigelila gravurado en la pasinta dudeka jarcento. Li estis premiita per la titolo "Popola Artisto de Ĉinio" kaj gajnis la Oran Premion pri la Internacia Paco de la Konsilio por la Monda Paco en la jaro 1955. Lia plej granda verkaĵo titolita "Pentraĵo pri Pino kaj Cipreso kun Versduo de Kvar-silabaj *Ĝuan*-kaligrafiaĵoj" estis aŭkciita je 42 550 milionoj da juanoj en la 22-a de majo 2011.

http://www.espero.com.cn/se/txt/2012-10/09/content_488196.htm de El Popola Ĉinio

/2/ Inter la 10a kaj la 20a de oktobro en la Zhejiang-a Arta Muzeo okazas la ekspozicio *Super Plena Luno* -- 150 kaligrafiaĵoj kaj manuskriptoj de la majstro Hongyi por festi la 132an datrevenon de lia naskiĝo kaj la 70a datreveno de lia forpaso.

Majstro Hongyi (1880-1942), origine nomata Li Shutong, naskiĝis en Zhejiang-provinco. Li estas unu el la pioniroj de la Nova Kultura Movado en Ĉinio kaj unu el la iniciatintoj de la ĉina moderna dramo. Li estas rigardata elstara artisto, edukisto, pensisto kaj novigisto. Inter la jaroj de 1905 ĝis 1910 li studis en Japanio; en la jaro 1918 li fariĝis bonzo kun budhista nomo Yanyin kaj literatura nomo Hongyi. Li estas unu el la plej renomaj bonzoj en la budhisma historio de moderna Ĉinio.

http://www.espero.com.cn/se/txt/2012-10/12/content_489147.htm de El Popola Ĉinio

Jarfina FESTEego kun Silvestra-Novjara FESTeno

okazos la 3an fojon en la franca Esperanto-kastelo Gresillon de la 28-a de decembro 2012 ĝis la 2a de januaro 2013. Detaloj: www.gresillon.org/jarfino

Kontakto: [+33-2.41.89.10.34](tel:+33-2.41.89.10.34), kastelo@gresillon.org

MCE Gresillon, F-49150 SAINT MARTIN D'ARCE

Kiel foto elektblas:

<http://gresillon.org/local/cache-vignettes/L54xH60/rubon26-1047b.jpg>

<http://gresillon.org/IMG/jpg/bebo24hGresillon-2.jpg>

<http://gresillon.org/IMG/jpg/Franjo0497.jpg>

http://gresillon.org/IMG/jpg/2011-12_jarfino_Coquisart1.jpg

Invitas: Bert Schumann < bert.schumann@gmail.com >

Unua C2-diplomito en Hungario

Per sukcesa ekzameno en Malago ĉe la naturamika Esperanto-Domo, Anna Bartek ĵus fariĝis la unua persono en Hungario kun C2-nivela diplomo, laŭ la [LingvoTesta Sistemo de la Esperanta Civito](#), kaj fakte entute pri nia lingvo, ĉar nek ITK nek la sistemo reklamata per <edukado.net> havas la nivelon C2.Sen. Anna Bartek estis ekzamenata de c-anoj Bertil Nilsson kaj Giorgio Silfer. Proponinte kiel fakan temon "la muzikan kulturon en Esperanto" ŝi akceptis d-ron Silfer kiel kompetentan, sekve la komisiono ne bezonis venigi eksteran fakulon. Ŝia skriba eseo estos enretigita kiel ekzemplo por samnivela testo. Estis ankaŭ dua kandidatino, por la nivelo B2, sed ŝi rezignis. Ĉiujn diplomojn laŭ LTSEC liveras Kultura Centro Esperantista. Necesas turni sin al KCE por organizi lingvotestan sesion. /HeKo 517 9-B, 19 okt 12/

Ekstera aldono: KCE = Kultura Centro Esperantista kce@esperantio.net

La petojn al la ekzamenoj oni povas sendi kaj pere de la menciita retadreso, kaj perpoŝte. Jen la poŝta adreso: Centro Esperantista, Caspostal 311, CH - 2301 La Chaux-de-Fonds.

Laŭ informoj de Anjo Amika --- Adri Pásztor

Nun estas la **50a jardatreveno** de la **revuo Hungara Vivo**, kio bedaŭrinde jam ne aperas.

Adri Pásztor

Ŝercoj

Kuracisto ĉe alia kuracisto

La bestkuracisto malsaniĝas kaj iras al la familia kuracisto.

- Kio estas via plendo? – demandis la doktoro.
- Mia sinjoro, mi estas bestkuracisto. Mi kuracas miajn malsanajn bestojn, ke nenion demandas de ili, ja ili ne scias respondi. Ĉu vi ne kapablas agi same?
- Sed jes. – respondis la doktoro iomete pensadante.

La doktoro ekzamenas senvorte la bestkuraciston kaj donas al li unun recepton.

- Jen, ĉi tiun medikamenton aĉetu en la apoteko!
- Ĉu tiu efikos?
- Jes. Sed se tiu ne estus bona, tiam mi dormigos vin ...
-

Hejma laboro

Plendas la edzino al la edzo:

- Atentu Eŭgeno, vi ĉiam hejmenportadas vian laboraĵon de la laborejo. Pro tio mi ne povas jam vivi plu kun vi!
- Nu, kaj! Multe da homoj agas same. Bedaŭrinde, ni devas vivi ĉi tiel ...
- Vi pravas, sed ne ĉiu estas SEKCI-MAJSTRO!

Enigmoj

Kial estas malantaŭe la vosto de la sciuro?

--- Ĉar antaŭe estas la sciuro.

Kio estas la dekoltaĵo?

--- Tio estas larĝa dekolto de la vestaĵo ĉirkaŭ la kolo, helpe de kiu la juna virino akiras edzon por si mem kaj la maljuna virino povas akiri gripon.

Esperanto-Ponto en Bydgoszcz en Pollando

Okaze de 125 Jaroj de Esperanto la 3-an de oktobro 2012 Konsilio de Urbo Bydgoszcz decidis honorigi la la gravan datrevenon per nomigo de ponto-kostruaĵo trans rivero Brda en Bydgoszcz "Most ESPERANTO". La 27-an de oktobro 2012 okazis oficiala malkovro de du tabuloj kun surskribo "Most ESPERANTO" je ambaŭ flankoj ĉe la Rivero Brda en Bydgoszcz....

Andrzej Grzębowski

Csorba, Piroska

Glaso de vereco

La monto-Avaŝ ankaŭ dum la malnovaj tempoj tiel altiĝis super Miŝkolcon, kvazaŭ estus ĝi komisiita por gardi la urbon nokte-tage. Sed ne nur la monto gardis la urbon, ankaŭ tiu gardis la monton; pli ĝuste la per botrito dense kovritajn vinkelojn, en kiuj estis fermentigita la fama vino de Miŝkolc. Pri tiu ĉi gardo atestas ankaŭ la nomo de la monto Avaŝ, ja la iama signifo de la vorto „Avaŝ” estis: defendita, malpermesita. Kio estis malpermesita iam sur ĉi tiu monto? Oni malpermesis, ke iu ajn paŝtadu ŝafoj tie, ja la keloj de la monto (proksimume pli ol okcent) estis 80-100 metrojn longaj kies plafonoj foj-foje estis nemulte sub la ternivelo. Tiel oni timis la kelojn kovrantan teron de la ebla ŝiriĝo okazigita de

la ŝafoj. Ni ne havas famon, ke iu ajn estus rompinta la malpermeson aŭ la mildaj ŝafoj estus povintaj frezeziĝij pro ektimo de io aŭ ĵus pro la drinkaĵo elfluinta de la bareloj. Sed la legendo temas pri tio, ke multe da strangaj aferoj okazis en keloj de monto-Avas kaj ĉi tiuj keloj ankaŭ nun kovras multe da sekretoj. Nome la 19. jarcenta endemio de filoksero povis pereigi la plantitajn vitojn sur la monton Avaŝ, sed la al ĝi ligiĝantaj legendojn ne.

Unu el inter la legendoj devenas el la turkaj tempoj. Okazis foje – en 1636, - ke Murrad; bejo de Eger kaj lia armeo subite atakis Miŝkolcon kaj ordonis al la urbestroj, ke ili portu antaŭ lin la kaŝitajn trezorojn de la urbo, sed ne povu trovi tiun pretekston, ke ili ne havas tenite sekretigitajn trezorojn, ĉar li scias, ke la trezoroj kaŝatas en profundoj de la keloj de monto Avaŝ.

La urbestroj fikse rigardis unu la alian, poste la plej maljuna, - kiu estis la plej saĝa, plej ruza, - tion diris:

- Kial ni kaŝus plu kara bejo, ke en keloj de monto Avaŝ trezoroj estas, se via ekscelenco jam scias tion? Sed tiu trezoro valoras nenion al Mahometanoj havantaj la ĝustan kredon!

- Kial? – miris la bejo suspektante trompon.

- Trezoroj de nia kelo estas la vino - respondis la urbestro - benita ne nur per petoleco kaj parolemo, - kiu bone sciis, ke la religio de Mahometanoj malpermesas la drinkadon de vino.

Sed bejo Murrad ne lasis sin superruzi kaj volis iri ĝis fino kaj rigardi ĉiujn kelojn. Li tiel saĝumadis, kie estas vino tie devas esti ankaŭ glasoj,- kaj povas esti, ke tiuj estas arĝentaj kaj orglasoj. Poste estroj de la urbo devis akompani la sinarmitajn turkojn kaj la bejon al flanko de monto Avaŝ, kaj lasi ilin tie fari kion ili volas. Kaj ili inundis ĉiun lokon kiel akridoj kaj iris en ĉiujn kelojn. Ili povis fari, ja multege estis – ne vanas la onidiro:”Ili estas tiom da, kiel la turkoj.” - Sed eĉ unu turko ne trovis oran, arĝentan drinkujon, nur senvalorajn malnovajn hanapojn faritajn el ligno kaj vin-elsuĉilojn el kalabaso. Hej, sed tre ege ili sopiris la trezorojn! Per torĉoj ili lumigis en la plej malgrandajn falsajn fenestretojn tranĉitajn en la kelo murojn, angulojn, eble brilos tie io, ja ili esperis trovi trezorojn. Bejo Murrad instigis la harnodojn havantajn turkojn por tre detale esplori la kurbajn tunelojn de volbaj keloj, kiam foje tre humile kliniĝade venis antaŭ lin janiĉaro kaj petis de la bejo aŭskulti lin.

La bejo aprobe mansignis, ke la janiĉaro paroleblas. Kaj li eldiris, ke lin la turkoj forrabis en lia infanaĝo de Miŝkolc, danko al Alaho. Murrad konsentis pri tio, ke ankaŭ laŭ li estas la plej granda feliĉo atinginta homon por estiĝi, naskiĝi turko. La janiĉaro daŭrigis kaj diris, ke li kaj lia avo ofte vizitis en keloj de monto Avas kaj de la avo scias li, ke ĉi tie oni gardas trezoron. Tiu trezoro estas la **glaso de vereco!** La bejo neniun trezoron serĉu (nek oran, nek arĝentanapojn). nur ĉi tion, ĉar tiu plivaloras de ĉio. Kiu drinkas el ĝi, tiu ekkonas la verecon. La bejo per avida scivolemo aŭskultis la janiĉaron kaj instigis lin por rememori kaŝejon de la glaso de vereco, ĉu lia avo parolis pri tio?. Kaj la bejo tre ĝojis, ĉar la janiĉaro skuis la kapon: nome tio signifas turklingve: jes.

Poste la glaso de vereco antaŭeniĝis de la kaŝejo, belege ornamita arĝenta hanapo, belega ĉizelista verko estis ĝi. La urbestroj estis furiozaj, ĉefe pro ilia senpovo, sed nenion povis fari ĉar bejon Murrad ĉirkaŭis multegaj armitaj turkoj. Ilia rigardo fulmojn ŝetis sur la janiĉaron, kial li povis fari tiun malhonoran agon kontraŭ tio ke li naskiĝis same en Miŝkolc. La janiĉaro kuraĝe rigardis ilin, Nenion parolis. Sufiĉis al li, ke li sciis: kvankam lia lipharo, hararo, turbano, turka kalsoneto, pantoflo havanta pintan nazon turkaj estis, sed lia koro restis vera hungara koro, kiu pulsas por sia patrolando.

Murrad tuj deziris drinki el glaso de la vereco. La Miŝkolcanoj verŝis en ĝin moston – ja vinon la bejo ne drinkeblis. La bejo pie levis la glason al sia buŝo, flanken ŝovante la lipharon. La Miŝkolcaj sinjoroj atendis spirhaltige la sekvojn, ne sciante imagi antaŭe, kio okazos, se el tiu fama ujo turko drinkas. Nur la janiĉaro - pensinta perfidulo - staris kun memfida trankvilo. Li rememoris tion, ke en sia infanaĝo sia avo rakontis al li pri tiu glaso, kiu diras la verecon al la homo kaj la glaso havas tiun mirindan potencon, ke ĝi kvietigas la malamikon.

Bejo Murrad glutis el la mioldolĉa densa mosto, oni preskaŭ povis vidi, ke la dian trinkaĵon li turnas en la buŝo kaj sur la rondavizaĝo plezuro speguliĝas, kio restas tie ankaŭ poste, kiam sur lia gorĝo la orflava trinkaĵo fluetas en profundon de lia stomako. Kiam ankaŭ la lasta guto atingis lian stomakon, li demetis la glason singarde sur la grandan skulptitan kverkotablon. La urbestroj nur tion vidis, ke li mansignis al siaj homoj kaj ili ĉiuj eliris el la keloj kaj sen rabo forlasis la setlejon, nenion kunportante, neniun domon detruante rabante. De tiam la Miŝkolcanoj, se iu menciadis la konatan onidiron, „En vino estas la vereco.”, tuj aldonis: „kaj la liberiĝo.”

Bejo Murrad atingis al Eger kun la patrolandaj turkoj kaj volis inviti la janiĉaron, sed tiu tiel malaperis, kvazaŭ la tero estus glutinta lin. Unuj parolis tion, ke dumvoje mortbatis lin lia iu kamarado sopiranta kaptiĵon. Aliuloj tiel rememoris, ke elirante de la kelo li haltis ie, demetis la turbanon kaj iĝis denove tute Miŝkolcano. Sed ĉi tiuj estas nur onidiroj. Ni devus drinki el glaso de la vereco, ĉar eble nur tiam ni povus diri certan pri lia sorto.

Oni diras, ke la glaso ne estis remetita al ĝia malnova loko, post ses jaroj la nova bejo de Eger vane serĉis ĝin. Ĉiam en alia kelo oni metis tiun en mezon de tablo, plenigante de la plej elstara vino. Ĉi tio okazis nur malofte, ja la scio de vereco ne estas bona ĉiam. El glaso de la vereco la ĉeestantoj povas drinki unu guton nur starante, ja ankaŭ unu guto de la vereco estas tre ege valora. Antaŭ ol iu tuŝis al sia buŝo la glason, iom da el ĝi li elverŝis kaj diris: „Al la harmodulo!” Ĉar la Miŝkolcanoj, - kiel ĉiuj hungaraj homoj - rememoris ankaŭ pri la mortinta malamiko.

La glaso de la vereco – kiel grandanimeco de la Miŝkolcanoj – ne malaperis. Ni scias el taglibro de Nikolao Wesselényi, ke 3-an de majo en 1827 ankaŭ li drinkis el ĝi unu gluton. Post unu jarcento la 16-an de majo 1933 la nekuraceble malsana Ferenc Móra petis letere la Miŝkolcan Ludovikon Marjalaki Kiss por aranĝi vindrinkadan societeton en lia kelo en monto Avaŝ, ĉsr povas esti, ke tie estas la fama glaso kaj li scieblis la verecon. Ĉu lia deziro plenumiĝis? Ni ne scias. Sed tio estas certa, ke la glaso de la vereco estas ie en iu kelo de monto Avaŝ. Oni ne trovis konstantan lokon por ĝi ekde evento kun Murrad, sed ĝi daŭre

migris plu ĉiam kaŝe. Ĉiam ĉe alia societo ĝi aperis, ĉiam alia tablosocieto honormenciis ĝin kaj gustumis guston de la vereco simileblan al nenio alia.

Jaroj, jardekoj, jarcentoj povas pasi, sur foliojn de la historio skribitaj literoj povas paliĝi, sed glaso de la vereco ne povas malaperi, ĝi ankaŭ nun kaŝiĝas en iu angulo de la kelaro de monto Avaŝ.

Historio de la Miŝkolc-urba Esperanto - Movado en 2012

Ni informas la karajn interesantojn, ke la kunveno de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” estas la samo de la redakto de la reta revuo kaj adreso de la informo-donantoj, la loĝejo de geedzoj-Pásztor: 3530, Miskolc, strato Arany János 35. IV/2.

De januaro ĉiu dimanĉe daŭre ni legas la esperantlingvan junularan romanon verkita de Ferenc Molnár; „Knaboj de Paŭlo-strato”.

De marto aliĝis al nia EAR; la geedzoj-Pipoly, kiuj jam delonge finis Esperanto-kursojn kaj tre ĝojis, ke ili povas ekzerci la internacian lingvon.

La 27-an de marto aperis hungarlingva rakontaro de sinjorino Adrienne Földi-Pásztor, kies titolo estas /Tündérek Tánca/„Danco de feinoj.” Ĝi enhavas 27 rakontojn. Krom la deponendaj ekzempleroj ricevis ekzemplerojn la bibliotekoj de la setlejoj Edelény, Győr, Szikszó, Boldogkőváralja, Szerencs, Miskolc, plue la Bazlernejo de Abaújszántó, Kulturdomo de Abaújszántó, Aŭstra Nacia Biblioteko en Vieno, Urba Biblioteko de Lodzo en Pollando, Bazlernejo en Nagybödöny: Subkarpatio en Ukraino, krome parencoj, amikoj kaj kreantokunuloj. Bedaŭrinde la Elektra Biblioteko de Biblioterko Széchenyi rifuzis aperigon de la hungarlingva rakontaro - aludante al manko de libera loko en la deponejo.

La 19-an de aprilo ni sciiĝis, ke sinjorino Pásztor ricevis la unuan premion okaze de hungarlingva fabelverkanta konkurso en la nialanda urbo Szeged. La ĵurio alte premiis ŝiajn tri fabelojn. En la fabellibro titolita „Nun mi sidas kaj fabelas al vi” tiuj tri fabeloj aperis presite. Pri la aŭtorino oni petis informon, kiu enhavas esperantistan vivovojon de sinjorino Pásztor.

Fine de aprilo ni ĉesigis legadon de la menciita junulara romano pro malsano de samideanino Parkánski. En la hospitalo kaj ankaŭ hejme ni vizitis ŝin. La viziton partoprenis ankaŭ Ildikó Király, nepino de Ludoviko Király nia nomdoninto.

La 13-an de junio en Esperanto-parko de Miskolc okazis florkronado de memortabulo okaze de 125. datreveno de Esperanto. La florkronadon partoprenis László Pásztor, sinjorinoj Pásztor kaj Judita Virányi el Miskolc, Jozefo Gulyás el urbo Ózd. La aliaj EAR-membroj kaj geesperantistoj ne ĉeestis pro malsano aŭ pro okupiteco.



Esperanto placo – Esperanto parko kun la memortabulo sur la dom-muro

Somere niaj amikrondanoj: la geedzoj Pipoly partoprenis esperantistan tendaron en Slovakio, kiu daŭris plurajn tagojn. Ili tie evoluigis ilian lingvoscion kaj bone fartis en la esperantista medio. Pri iliaj travivaĵoj ili raportis en oktobro.

La 4-an de aŭgusto anoncita estis dum la UK en Hanojo en Vjetnamio, ke s-rino Pásztor denove ricevis la premion „honora mencio” pro sia historia dramo, kies titolo estas „Ombro en lumo”. Ĉi tiu estas jam ŝia tria diplomo pri „honora mencio”. Alia hungara esperantisto ne ricevis premion.

La 14an de aŭgusto nia samideano, Stefano Pál forpasis.



Stefano Pál.

Por partopreni dum la entombigo s-rino Pásztor informis la geesperantistojn de nia kaj de aliaj urboj. Ŝi transdonis la kondolencantajn salutojn al la vidvino. Jozefo Halász diris funebran parolon nome de la fervojistaj esperantistoj. Sinjorino Pásztor skribis nekrologon en revuo „Nordhungaria informo” pri sekretario de la eksa Esperanto-Fakrondo de „Rónai Sándor” Departementa Kulturdomo de urbo Miskolc. Retmesaĝe kondolencis: Probal Dasgupta, prezidanto de UEA el Hindujo, Osmo Buller, direktoro de CO de UEA, el Rotterdamo Nederlando, Elda Doerfler de Esperanto Asocio de Triesto Italujo, Magdalena Feifičová el Ĵilina, Milan Neubeller el Poprad-Slovakio, Sylvia Hamalainen el Tampere-Finnlando, Anna Bartek, el HEA el Budapeŝto, doktoro Imre Ferenczy el Győr, Jozefo Gulyás el Ózd, sinjorino Julio Várhelyi el Tokaj, Jozefo Eszényi el Szolnok, sinjorino Enikő Zengő- Seregi el Nyiregyháza, sinjorino Helena Fodor el Miskolc, Hungario.

La entombigan ceremonion ĉeestis D-ro Jozefo Halász, geedzoj Lukács, Maria Buŝai, Nikolao Fázold, Ildikó Király sinjorino doktoro Vu kaj la geedzoj Pásztor.

La 25an de aŭgusto travojaĝis nian urbon slovakia esperantisto sinjoro Teodor Andreas. Alveninte la trajno en Miŝkolc-on ĉe la trajno por saluti atendis lin geedzoj Pásztor per Esperanto-flago. Kelkaj homoj demandis sur la fervoja perono pri la flago, poste ankaŭ pri la lingvo kaj pri ties lernebleco. Ni donis al ili nian nomkarton dirante, ke ili povos lerni kaj en lingvolernejo kaj de ni, kaj se ili volos ellerni ĝin, serĉu nin por preparoli la aferon.

En septembro ni faris belan ekskurson kun nia klubanino Judita Virányi en Lillafüred. La geedzoj Pásztor daŭrigis la vizitojn en la regiono kaj faris viziton al la setlejoj Rudabánya, Sajóbáony, Edelény kaj Sajóecseg. Pri iliaj vidindaĵoj ni skribos en la sekvaj numeroj de nia retgazeto. Ĉimonte finiĝis grandaj, gravaj traduk-laboroj de du eseoj. László Pásztor esperantigis kaj aperigis en la revuo NHI: eseon de Karlo Sziklavári [siklava:ri] pri: Muzika vivo de urbo Miskolc. Sinjorino Adrienne Pásztor esperantigis eseon de doktorino Anna Orsóš, pri la: Beaŝ-ciganoj de Hungario.

Fine de septembro, la HAT (Societo de Montosubaj Kreantoj) donis la kvaran premion pro hungarlingva novelo de s-rino Pásztor. La novelo aperos presite ankaŭ esperantlingve en decembro en la sekva antologio de la Verkanta Societo.

La 6an de oktobro florkronado okazis en setlejo Abaújszántó, ĉe la memortabulo pri doktoro K.K.Kalocsay kaj ĉe lia busto. La eventon partoprenis 5 homoj parte de la Urbeŝtaro de la urbeto kaj de la EAR „Király Lajos”. Ĉeestis ankaŭ la eksa urbestro Zoltán Soltész, kiel iama membro de la Esperanto-Rondo de Abaújszántó. (La Esperanto-grupon fondis doktoro László Molnár.)



La 6-a Oktobro en 2012.

Oktobre László Pásztor esperantigis hungarlingvan tekston pri preĝejoj de urbo Vác, antaŭhelpante la venontjaran sukceson de Amika Renkontiĝo de Fervojistaj Geesperantistoj en Vác.

La 15-an de decembro ni organizos rememoron ĉe mamortabulo de Zamenhof, temos pri la 125a datreveno de Esperanto, kaj la sekvontjara centjariĝo de la nia urba Esperanto - movado en Miskolc en 1913.

Ladislao Pásztor

Albana vivo



Mia nomo estas Bardhyl Selimi. Mi estas Albano kaj naskiĝis en 1945 en urbo Kosovo. Mi finstudis pri la fako matematiko en la jaro 1967. Kvardek jarojn mi instruis matematikon en universitato kaj mezlernejoj. En la jaro 1961 mi esperantiĝis, pensiiĝis en 2007. Mi estas edziĝinta kaj havas du filojn same edziĝintajn. Mia edzino estas eksa kuracistino kaj ŝi same pensiiĝis jam. Mi ŝatas legi ankaŭ esperantaĵojn, kaj esperantigi literaturaĵojn el temoj de la albana vivo kaj kulturo. Jen, vidu nun du el ili. Bonan legadon mi deziras kaj dankas la eblon por aperigi ilin: Dankon, Bardhyl Selimi el Albanio

El Albanaj Rakontoj

Xhaferr Martini

Ĉemizo de la feliĉulo

- Esperantigita de Bardhyl Selimi -

La reĝo de Burxull opiniis ke li regas juste. La korteganoj, ministroj kaj proksimuloj, pri tio konfesis ĉiutage ke la reĝo sentas sin fiera, ĉar kvankam li ekzercis absolutan potencon regadon, tamen la homoj estas feliĉaj. Parolante pri la ceteraj reĝoj loĝantaj al tiu loko proksime aŭ malproksime, li diradis:

“Neniu regas pli juste ol mi. En kiu ajn alia reĝlando oni apenaŭ povas trovi feliĉulon, aŭ kontentulon”.

Ministroj kaj korteganoj, rigardante sian reĝon tiom bonfartan daŭre laŭdis lin.

Dume en la palaco ekzistis oficejo, ekde tempo de lia patro, kie oni akceptis petojn, sugestojn kaj plendojn de la civitanoj. La oficejo funkciadis enorde, ĉar la iama reĝo, konsideris la dirindaĵojn, ekaŭdis la voĉon de la popolo, kvankam kiel de ĉiu reĝo ankaŭ liaj oreloj estis iom malbone aŭdantaj.

Sed laŭ la juna nova reĝo tiu oficejo ŝajnis neutila kaj sekve nebezonata.

La ministro pri informado, konante deziron de la reĝo por glorigi sian regadon kiel justa kaj senmakula, estis ordoninta la sekretarion de la oficejo kaŝi la plendojn de la popolo por ke tiuj ne maltrankviligu la reĝon.

XEn la kunveno de la registaro la ministro estis kiu mem deklaris, ke tiu oficejo, kie oni apenaŭ ricevas iun plendon ne devas ekzisti plu. Krome, aldonis li, ke li jam milfoje deklaris

la fakton evidenta ke la reĝo regas juste. La ceteraj ministroj ne nur tuj aprobis ĉi tiun eldiron de la kolego, sed ankaŭ longe aplaudis lin. La aferoj en la reĝlando de Burxull glatis, sed okazis io ne atendita: la reĝo grave malsaniĝis. Lin vizitis la plej bonaj kuracistoj de la lando, sed ili nenion povis fari, ĉar la kaŭzo estis nekonata.

Iutage, preterpasis la palacon maljunulo kiu pretende fanfaronis ke li kapablas resanigi la reĝon. Kvankam la reĝo ne fidis je la vagabondoj, li ordonis al la gardistoj permesi al li enveni. Sed la reĝo mem ne volis babilu kun li senpere. Tiel li petis la ministron por akiri informon per babilado de la maljunulo. Poste oni eksciis ke la maljunulo mem ne povos kuraci la reĝon, sed li diris ke tio estos ebla, se la reĝo survestos ĉemizon de iu feliĉulo en lia regno.

La korteganoj, ministroj kaj proksimuloj de la reĝo ne povis esti feliĉaj, ĝis kiam ilia moŝto malsanas. La ĉemizo de la feliĉulo devus esti serĉata en profundo de la regno, ĉe tiuj kiuj ankoraŭ nenion sciis pri la reĝa malsano. Por ne perdi tempon, ekveturis tri junaj rajdistoj, estrataj de la komandanto de la reĝa gvardio. Ili ĉirkaŭrajdis la tutan regnon tre rapide por serĉi feliĉulojn. Ili vizitis la riĉulojn, ĉe kiuj mankis nenio. Sed kia miro! Neniu el ili estis feliĉa. Ili estis riĉaj, potencaj, plenaj de sano, sed nenimaniere feliĉaj. Tion tiuj mem konfesis proprabuŝe, do ili ne bezonis demandi tiujn pri la kialo de malfeliĉeco. Do, ne estis senco ke ili prenu ties ĉemizojn por resanigi la reĝon.

La komandanto de la reĝa gvardio bone sciis ke oni lin atendas senpacience en la palaco, sed neniu tie povis imagi pri la malfacilaĵoj renkontitaj de rajdistoj.

Tiel serĉante kaj serĉante feliĉulojn, tiuj ne troviĝis en la tuta regno. Ili denove faris enketojn laŭvice unu post la alia, sed sen sukceso.

Oni demandis ankaŭ Myqerem [mireĉem] bejon, - posedanta la regionojn de Drinas, Transdrinas, Breglumas, - kiu estis juna kaj forta, riĉa senfine, kun tre ĉarma edzino, kun 40 miloj da ŝafoj, kun du salejoj portantaj al li multe da enspezoj, sed surprizige li respondis, ke fakte li estas la plej malfeliĉa homo.

- Hundaĉo - senprudente diris al li la komandanto de la reĝa gvardio.- Kial do vi ne estas feliĉa? Ĉu vi deziras ke Lia moŝto ne resaniĝu? La reĝo jam donis al vi ĉiujn, ĉi tiujn bonaĵojn kaj tamen vi estas sendanka?

- Ne hastu Sefedin agao - respondis Muqerem [mureĉem] bejo malfacile retenante sin.- Vi ne scieblas kial mi ne estas feliĉa.

- Kial, vi ido de hunadaĉo, ĉu vi deziras ekhavi nian tutan regnon?

- Ne tion, ne tion,- mallaŭte diris Myqerem bejo kaj montris per mansignoj

ke li ne povas paroli antaŭ okuloj de la gardiaj rajdistoj.

- Iru bravuloj kaj manĝu kelkajn ĉerizojn en la ĝardeno - petis li ilin kaj post kiam li restis sola kun Sefedin agao, stariĝis de la sidloko, kaptis permane la komandanton de la gvardio, kondukis lin al la fenestro de kie vidiĝis la granda ĝardeno, kie laboris viro kun densharara brusto, kiel urso, kun malgrandaj okuloj, griziĝinta sed preskaŭ sen okulharoj kaj sen brovoj.

- Ĉu vi vidas tiun viron Sefedin agao kiu tranĉetas la arbojn?- demandis lin

Muqerem-bejo.

- Jes, mi vidas lin.
- Li estas la kaŝedzo de mia edzino, tiu ĉarmulino pri kiu vi jam aŭdis eĉ en la reĝa kortego.

- “En tiu ĉi nia regno estas io, kio tre malbonodoras”: pro io la aferoj iras tre aĉe, volis eldiri la komandanto de la reĝa gvardio, sed li subigis sian deziron kaj dentopremis por ke ne malfermu la buŝon al ofendo.

- Mi ne plu povas kontentigi virinon - konfesis Myqerem bejo – ĉar mi estas impotenta, nekoitiva. Mi edziĝis por ne postlasi la riĉaĵojn miapartajn al miaj fratoj. Dume la virino apenaŭ povas ekzisti sen viro kaj ĉiun nokton ŝi dormas samlite kun tiu urso, ne kun mi. Kiel mi povus esti feliĉa?

- Unuvorte, en nia regno - diris Sefedin agao - ĉiu havas sian kaŝitan mizeron, sed la via estas la plej granda.

Poste li alvokis la rajdistojn kaj ordonis ilin pretiĝi por reiri esperon perdinte.

Kiam ili preterpasis vilaĝan strateton, aŭdis iun kanti. La voĉo ne estis tiel agrabla: fakte ĝi estis iom dika, malmola, sed la kanzono, mem, allogis ilin, kvankam ne melodie. Maldekstre estis la rivero, kun kampetoj ĉeborde, semitaj per maizo. Ili ekveturis frujunie, kiam la maizplantoj jam pretis por senherbaĉiĝi kaj nun la maizspadikoj jam estis preskaŭ maturaj. Ili ekiris orgojluloj, vestintaj en uniformojn brilaj kaj nun revenas malpuraj, malglataj kaj esperperditaj. Dume ili ekflaris bonan odoron de la freŝaj maizspadikoj bakitaj surfajre, kvankam alta heĝo el arbetoj baris la elvidon. Kiam la heĝo finiĝis, ili rimarkis ĉe la fajrejo kie bakiĝis la maizspadikoj ĉe rivera bordo, viron kantantan, ĉirkaŭ kvindekjaran.

- Venu! - ordonis la komandanto.
- Kien ni iru?- demandis unu el la rajdistoj.

Ili estis jam tro lacaj kaj enuiĝintaj, tial ne alparolis aliulojn respektive kun la mano surkore kiel la unuan tagon de ilia serĉado de feliĉulo.

- Li kantas, do li devas esti feliĉa - diris Sefedin agao.
- Ĉu ne kantas multaj homoj same?- rimarkis unu el la akompanantoj,

tamen ili estis irantaj al tiu kantanto.

- La buŝo povas kanti, sed la koro povas plori. Tiu ĉi viro estas ĉifonulo. Kiel eblas ke li estas feliĉulo?!- aldonis la alia akompananto.

Sefedin Agao salutis la viron bakintan maizspadikojn. Li havis mienon de hunda ido kiu estis enkotuminta por trovi nutraĵon. Sed li estis sana, kun okuloj mirantaj, dikaj lipoj kaj kapharoj glataj kvazaŭ lin estis ĵus lekuminta la bovino. Ekvidinte la kvaropon da viroj, li interrompis la kantadon, ne montrante sin timigita.

- Ĉu Vi kantis?- demandis lin la komandanto.
- Jes, mi kantis - respondis li.
- Vi devas esti feliĉa ĉar vi kantas, ĉu ne? Aŭ ĉu vi faras tion ne pro tio?
- Feliĉa mi estas, efektive feliĉa - konfirmis la viro kaj vere ŝajnis tia, almenaŭ tiel,

kiel li komprenis la feliĉon.

- Kial vi estas feliĉa?

- Mi ne scias tion.

La komandanto sciigis lin pri la celo de ilia alveno kaj vagado dum tri monatoj tra la regno.

- Donu al ni vian ĉemizon por ke ni alportu ĝin al la reĝo. Ni pagos anstataŭ ĝi oron.
- Mi bedaŭras sinjoroj, sed mi ne havas ĉemizon - respondis la viro bakanta la maizspadikojn.

Poste li malfermis la mantelaĉon per kiu li envolvis sin: aperis la nuda brusto. Ververe li ne havis ĉemizon.

La komandanto de la reĝa gvardio foriris galope kaj la akompanantoj postsekvis lin.

Centjariĝo

Nur du jarojn antaŭ la komenciĝo de la Unua Mondmilito naskiĝis en Balkanio la nova sendependa ŝtato - Albanio. Ĝi estis la lasta el la iama Otomana Imperio en la Duoninsulo kiu akiris sian memstarecon. Sed tio estis entrepreno ege doloriga kaj drameca.

La “malsanulo” de Bosforo obstine klopodis pluteni en siaj manoj la okcidentan ekstreman provincon, el kiu ĝi estis deviga plurfoje donaci al la jam ekzistantaj suverenaj ŝtatoj najbaraj (Montenegro, Serbio kaj Bulgario), diversajn grasajn pecojn dum 19. jarcento, kiel ekzemple tio okazis post la ruso-turka milito en la jaro 1878.

Tial Albanoj ribeliĝis plurfoje en la jaroj 1910,1911 kaj 1912, precipe en Kosovo-regiono. Ili sukcesis eĉ okupi urbojn Priŝtina kaj Skopje.



Balkanio antaŭ la Unua Mondmilito

Dume la registaroj de Serbio, Montenegro, Bulgario kaj Grekio decidis alianciĝi kontraŭ Otomana Imperio por ke, post la venko, ili disŝiru el ĝi pliajn teritoriojn, plejmulte el la albanaj vilaĝetoj (Ŝkoder, Kosovo, Manastir, Janina). Ilin forte subtenis Rusio, kiu intencis krei tiel en Balkanio iun fortan baron kontraŭ Aŭstrohungario. Ĉi lasta kontraŭe pludeziris ke oni konservu la aktualan politikan staton.

Sed la 7-an de oktobro 1912 Montenegro deklaris militon al Turkio, sekvata la 17-an kaj 18-an de oktobro de la ceteraj ŝtatoj. 286 000 serbaj soldatoj eniris albanajn teritoriojn en Kosovo, Makedonio kaj Albanio, frakasante la turkan armeon en pluraj frontoj. Ili dezertigis centojn da vilaĝoj kaj mortigis dekmilojn da albanaj civilulojn, strebante “etnopurigi” la

okupitajn teritoriojn. Same agis 20 000 montenegranaj soldatoj, centmiloj da grekoj kaj bulgaroj.

Albanoj alarmiĝis kaj tuj organizis sian fortan rezistadon. Multaj iliaj gvidantoj kunvenis urĝe kaj decidis fari plejblon por konservi tion kio estis savebla el iliaj teroj. Delegacio estrata de Ismail Qemali vojaĝis al eŭropaj centroj (Vieno, Londono, Romo, Budapeŝto k.a.) por peti la kunsenton de ties registaroj.

Subtenita de Aŭstrohungario kaj Italio, ĝi alvenis en la urbo Vlora, ĉe Adriatika marbordo ankoraŭ libera kaj kunvokis ĝeneralan kunvenon de reprezentantoj el tutaj albanaj teritorioj. Tiel, la 28-an de novembro 1912, tagmeze, oni sukcesis unuanime deklari antaŭ la popolo arigita ekstere la sendependecon de Albanio.



La deklaro de sendependecon en Vlora

Kvarcent volontuloj el la jam okupita Kosovo, gviditaj de Isa Boletini alvenis tagon poste por subteni la novan unuan albanan registaron, estrata de Ismail Qemali, kiu siaflanke alvokis al la registaroj eŭropaj agnoski la sendependecon de la lando.



La alveno de 400 kosovaj volontuloj

Dume la ceteraj partoj de la lando suferis la sovaĝan kaj sanguman okupadon fare de armeoj de la najbaraj ŝovinismaj landoj. Ŝkoder kaj Janina daŭre estis sieĝataj de serbo-montenegranaj kaj grekoj.

La grandaj potencoj maltrankviliĝis pro la nova statuso politika en Duoninsulo. Ili kunvenis en Londono por decidi pri la novaj landlimoj. Rusio deziris ke Albanio estu nur ŝtateto ampleksinta la mezan Albanion, dum Aŭstrohungario celis pli larĝan landon, ampleksinta krom Albanio ankaŭ certajn teritoriojn albanaj en Kosovo, Grekio, Makedonio kaj Montenegro.

Rezulte, oni decidis pri la aktualaj landlimoj de Albanio, t.e. amputita lando kaj nacio, ekster kiu etendiĝis pli ol duono.

Kiel ajn, albanaj gvidantoj konsideris tion ian gravan akiraĵon, ĉar la nova sendependa ŝtato fariĝus forta subteno por ĉiuj albanoj en la Duoninsulo.

La vivo de la unua registaro de Ismail Qemali estis mallonga ĉar Eŭropon trafis somerofine de 1914 tragika milito. Albanion denove eniris la armeoj de ambaŭ intermilitantaj aliancoj, foje aŭstroj kaj bulgaroj, foje francoj, serboj, grekoj, italoj kaj aliaj. La lando pludezertiĝis ĝis la fino de tiu fifama mondmilito.

Granda danĝero stariĝis denove dum la Packonferenco de Versajo, ĉar la ŝovinismaj registaroj najbaraj faris plejblon por elŝiri pliajn partojn el teritorio de la restinta sendependa Albanio. Sed tion malhelpis notinde ne nur la forta volo popola albana, esprimita en la Kongreso de Luŝnja januare 1920, sed ankaŭ la subteno fare la deklaro de usona prezidento Uilson favore al la memdecidemo de popoloj.

Finfine oni akordiĝis lasi Albanion trankvila en sia memstareco, eĉ invitis ĝin al la Ligo de Nacioj en la jaro 1921. La jaroj 1921-1924 notas interesan periodon de parlamentarismo nekonata antaŭe ĉe albanoj, kiu konkludiĝis per registaro de Ahmet Zog, elektita prezidento en 1925 kaj poste reĝo en 1928. Ĉi lasta invitis fremdajn kompetentulojn por organizi modernan administracion, armeon kaj policon kaj entreprenis diversajn centralizigajn reformojn.



Ahmet Zog La Unua

La okupiĝo de la lando far faŝisma Italio la 7-an de aprilo 1939 kaj mem la dua mondmilito notis alian malfacilan periodon por albanoj, sed ankaŭ novan statuson de ties landlimoj. Ekde aprilo 1941, nazioj aneksis al Albanio multajn teritoriojn okupitaj de Jugoslavio en Kosovo, Makedonio kaj Montenegro. Ĉi kaze tie ekfloris unuafoje albanlingvaj lernejoj kaj administracioj.



Albanio en la jaroj 1941-1944

En la jaro 1945, fino de la dua Mondmilito, Jugoslavio rekaptis Kosovon kaj Makedonion. Plue, stariĝis nova danĝero en la Paĉkonferenco en Parizo, ĉar Grekio pretendis tutan sudan parton de la tiel nomata “Londona” Albanio, t.e. sudan Albanion. Bonŝance, la komunisma reĝimo instalita enlande akiris fortan subtenon fare de la tiama Sovetunio kaj Jugoslavio komunismaj.



La komunisma diktatoro Enver Hoxha

46 jarojn, la lando plurestis sub totalitarismo komunisma kaj post 1961 jaro, eĉ des pli, post 1978 jaro, en tuta izoliteco, ĝis en la jaro 1991 la sistemo politika kolapsis.

Ekde tiam albanoj aliĝis la la eŭropa granda familio kies parto natura ili jam estis ekde jarcentoj. La ekonomia nivelo pliboniĝis notinde (la enspezoj averaĝaj pokape altiĝis de 300 USD ĝis 4500 USD) kvankam ankoraŭ la lando konsideriĝas la plej malriĉa en la malnova kontinento.

Ekde la jaro 1999, albanoj havas duan sian ŝtaton kiu sendependiĝis en 2008. Tio estas Kosovo. Kunlaborante en ĉiuj kampoj ambaŭ ili sin pretigas aliĝi estonte al EU.

La 79-a Itala Kongreso de Esperanto

16 - 25.8.2012

Ĉi-jare estis elektita Sicilio por kongresi. Suno, maro kaj Esperanto altiris multajn geesperantistojn el kvin kontinentoj. La kongreson partoprenis pli ol 330 samideanoj el 32 landoj. La itala nacia kongreso fakte fariĝis internacia. La kongreso okazis ĉe la mediteranea marbordo en multkultura urbo Mazaradelvalo. Mazara havas pli ol 51 000 enloĝantojn. Ĝi situas en la provinco Trapanio. En ĝia historia urbocentro troviĝas multaj preĝejoj kaj aliaj historiaj konstruaĵoj. Tre agrabla estas promeno en la araba kvartalo tra mallarĝaj stratetoj kun domoj surmure ornamitaj per fajencaj bildoj. Dum la kongreso aldoniĝis fajenca ornamaĵo pri Esperanto farita de lernejanjoj de la Arta liceo. Ni kongresis en hotelo “Hopps”. Multaj el ni ĝuis la hotelan naĝejon aŭ Mediteranean maron. Pro granda varmeco la homoj posttagmeze siestas. La urbo revigliĝas vespere ĝis malfruaj noktohoroj. Amaso da afiŝoj pri prezentadoj por la publiko kaj pluraj surstrataj banderoloj anoncis la kongreson. La enloĝantoj havis eblecon “gustumi” Esperanton propraorele kaj propraokule dum ĉiutagaj vesperaj koncertoj.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro de la kongreso. Unue la membroj de la LKK -

Bruĉjo Kasini kaj la prezidanto de Itala E-Federacio Aldo Grassini bonvenigis nin. Sekvis paroladoj de profesoro Khaled Fouad Allam pri interkulturo kaj la festparolado de Barbara Pietrzak la ĝenerala sekretario de UEA. Intertempe venis la urbestro, s-ro Nicoló Cristaldi kiu entuziasme bonvenigis nin kaj poste sekvis kutimaj salutoj de E-institucioj kaj de reprezentantoj el diversaj landoj. Post la E-himno la kongreso estis malfermita. La urbestro tre favoras disvastigon de Esperanto. En Mazara estis starigita Centro por Esperanto kaj Interkulturo. Ĝi celas disvastigon de la lingvo en la lernejoj. Jam antaŭ la kongreso pli ol 500 homoj (ĉefe lernejoj, studentoj kaj instruistoj) sekvis entuziasme kurson de Esperanto. La instruado daŭros ankaŭ estonte.

La temo de la kongreso estis “Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof”. Ĝi estis pritraktita en du seminarioj gvidataj de Kristin Tytgat kaj Elizabeth Schwarzer. La riĉa programo proponis prelegojn, seminariojn, trinivelajn E-kursojn kaj ankaŭ rapidan kurson de la itala lingvo. Katalin Kováts gvidis intensan trejnseminaron por instruistoj kaj instruantoj de Esperanto. Ŝi ankaŭ zorgis pri KER-ekzamenoj kaj disdonis diplomojn al sukcesintoj de antaŭaj ekzamenoj. Ne mankis libroservo, ekspozicio pri Esperanto, prelegoj kun aperitivo por la publiko, promeno tra la urbo kun la urbestro, kantado kun duopo Ankie kaj Nanne de la muzikgrupo Kajto, mediteraneaj vesperoj kun Davide Astori, noktaj junularaj mojosaj programeroj, animitaj de talenta italo Michael Boris Mandirola. Same kiel lastjare okazis Verda Foiro, kaj eblis aĉeti filatelaĵojn kun poŝta stampo de la kongreso. Sur la ĉefa placo oni starigis podion, kie niaj plej elstaraj kantistoj kaj muzikistoj havis eblecon vespere prezenti koncertojn. Inter la plej famaj estis JoMo, Kim kaj ensemblo Kajto. Ĉiuj havis grandegan sukceson kaj plurcentan publikon. Ankaŭ sur la strandoj aperis kelkaj lokaj muzikantoj, kiuj plezurigis laŭstrandajn promenantojn kaj eĉ instigis iujn al dancado sur trotuare. Al buntaj muzikaj vesperaj programeroj kontribuis impresa mezepoka prezentado de sicilia historio en formo de parado. Bela spektaklo de dancoj, teatreaj movoj en historiaj kostumoj. Oni komencis ĝin el tempo de grekoj, sekvis araboj, normanoj kaj tiel ĝis nuntempo. La procesio estis spektata kaj forte aplaŭdata de homoj starantaj sur plenŝtopitaj trotuaroj ambaŭflanke. Alia nokta procesio temis pri la religia parado por Sankta Vito. En la internacia vespero oni multe kantis, gitar- kaj flutludis, deklamis, teatrumis. La etoso estis gaja.

Tre allogaj estis multnombraj ĉiutagaj ekskursoj al diversaj lokoj ligitaj kun la prahistorio de la okcidenta parto de Sicilio. Ni ĝuis vizitojn al la urboj: Palermo, Agriĝento kaj la Valo de la Temploj - Erice, salmarĉoj kaj Trapani - Salemi, Sciacca, Sambuca. Interesaj estis la templo kaj amfiteatro en Segesta kaj la temploj de Selimunte. Dum tiuj ekskursoj ni vizitis kelkajn muzeojn: pri konkoj, pano, salo, tinuso. Pluraj ceramikaj vendejoj ravis nin kaj ankaŭ vizito de teatro. Koncerne Sicilion oni ofte pensas pri mafio. Ni ne renkontis mafianojn (feliĉe!), sed ni havis okazon viziti muzeon pri mafio. Ni ŝipekskursis al la insulo Flavignan. Iuj preferis biciklajn ekskursojn kaj promenojn. Ĉie ni renkontis afablajn homojn, kiuj ŝatis paroli kun ni kaj iuj eĉ interesiĝis pri Esperanto. La etoso estis varmega same kiel la vetero. La venonta, jubilea itala kongreso okazos en Liguria en Kastelaro proksime al San Remo. Tie estos nova okazo ĝui interesan E-aranĝon kaj krei novajn amikajn kontaktojn.

Liba Gabalda

Nova esperantlingva verko

Mi informas vin karaj legantoj, ke nova esperantigita hungara verko aperis niatage. La aŭtoro de la junulara verko estas: Ferenc Móra (http://eo.wikipedia.org/wiki/Ferenc_Móra). Lian verkon - A Kincskereső Kisködmön/La trezorĉasa feljaketó - esperantigis: László Vizi. La verko atingebla estas en Elektronika Biblioteko de la Biblioteko Széchényi en Budapeŝto, ĉe:

<http://mek.oszk.hu/11100/11135/11135.htm>

Serĉu, legu kaj ĝuu ĝin. Antaŭdankojn.

Adri Pásztor

Belaj ilustritaj fabeloj

Grupo da esperantaj tradukistoj kaj bildistoj tre ĝentile sendis al ni belajn ilustritajn fabelojn por senkoste disdoni ilin, sed la grupo petas anonimecon. Jen la ligilo por senpaga elŝuto:

<http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/> Oni povas kopii kaj disdoni ĉi tiujn dosierojn sed senkoste kaj sen profita celo!

Korajn salutojn: Portal Kunlaboro - www.kunlaboro.pro.br/<kunlaboro@kunlaboro.pro.br>

Sendinto: Aloísio Sartorato-Brazilio

Ni funebras

“En la 10-a de novembro 2012, sabate, je la 7:00 s-ro Li Shijun forpasis en Pekino pro malsano. Li Shijun, la Esperanto-nomo Laulum, naskiĝis en la 29-a de marto 1923. Li eklernis Esperanton en 1939. Li estis eksa vicĉefredaktoro de El Popola Ĉinio kaj membro de la Akademio de Esperanto. Li esperantigis multajn ĉinajn famajn klasikajn romanojn kaj novelojn, ekz. Ĉe akvorando, Pilgrimo al la okcidento, Romanoj pri la tri regnoj, Mirrakontoj de Liaozhai kaj tiel plu. Liaj kelkaj tradukaĵoj enlistiĝis en la Serio Oriento-Okcidento de UEA. Dank al tio li ricevis la premion Grabowski de UEA en 2003 kaj la premion de la Dumviva Honora Premio pri Tradukado de la Ĉina Tradukista Asocio en 2010, la plej alta premio de la ĉina traduka rondo, kaj la premion de la dumviva kontribuo de la Ĉina Esperanto-movado en 2011.... Lia forpaso ne nur estas granda perdo de la Ĉina Esperanto-movado, sed granda perdo de la Monda Esperanto-movado. Ĉi tie en nomo de LEA kaj en nomo de la komisiito de la projekto Ĝemelaj Urboj mi esprimas tristan kondolencon al ili kaj liaj familianoj. Eternan pacon, s-ro Li Shijun. Wu Guojiang; Vic-prezidanto de LEA, Komisiito de UEA pri la projekto Ĝemelaj Urboj.”

Kun granda malĝojo ni informas, ke la 18.11.2012 forpasis nia Amiko

Prof. dr Remigiusz Mielcarek en aĝo de 55 jaroj

famkonata Esperanto – mondvojaĝanto, kiu vizitis pli ol 270 landoj de la mondo

Profesoro de AIS – Akademio Internacia de la Sciencoj kaj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kiu estis aŭtoro de pluraj gvidlibroj kaj mapoj pri diversaj landoj de la mondo kaj la tutan vivon laboris por internacia edukado.

Koraj kondolencoj por Lia Familio transdonas

Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, Internacia Klubo "Esperantotur" en Bydgoszcz, Internacia Klubo de Senjoroj en Bydgoszcz, Internacia Universitato de Tria Aĝo en Bydgoszcz, kaj Filio de Pola Esperanto Asocio en Bydgoszcz

La Adiaua Ceremonio okazos la 22.11.2012 horoj 13.15 – 13.30 en Adiaŭa Salono ĉe Krematorio Poznań – Miłostowo. La Entombigo okazos la 30.11.2012 horo 12.30 en Tombejo Poznań – Junikowo. Kondolencoj eblas sendi rete al Lia Patro jozefmielcarek@wp.pl La anoncon sendis: tur@esperanto.bydgoszcz.eu"

Valentin Melnikov

Post unu jaro

Pasis jar', kaj denove aŭtuno

min instigas al trista medit':

kial nin ne kompatas fortune?

kial vivas mi kvazaŭ ermit'?

En profundoj de l' tempo jam dronis

la renkont' en pasinta juli'.

Sed la sorto mallice ordonis:

unufoje dum jar'! Kaj ne pli!

La real' ĉiujn revojn detruas,

je renkonto ne estas eĉ ŝanc'.

Inter ni jam denove situas

pli ol milkilometra distanc’.

Senutilas ja vei kaj plendi.

Ĉio pasas. Kaj daŭras la driv’.

Mi ne multon aŭdacas pretendi,

ne dorlotas min fluo de l’ viv’.

Revas mi vin karesi tenere,

multajn ĝuojn donaci sen fin’ –

tamen vanas la revoj. Ĉu vere

tro malfrue renkontis mi vin?

Mia kara! Ĉu vere – malfrue?

Ĉu ne eblas de l’ vivo korekt’?

Tamen kiel do vivu ni plue?

Kia estu plej inda elekt’?

Vi al miaj admonoj ne cedas,

firmas via rifiŭza rezist’.

Eble stultas la kred’, sed mi kredas,

ke ne vanos obstin’ kaj persist’.

Mi esperas: la sorto decidos

ĉion juste. Kaj venos la hor’,

kiam ni ardajn sentojn ne bridos

kaj feliĉos en ĝua amor’!

1990–92

Budapeŝta ekzameno

Satira rakonto de la aŭtoro Sándor Szathmári (1897–1974)

Z: Zamenhof
1: Unua profesoro
2: Dua profesoro
L: Lernanto

Ĉambro, meze iom oblikve staranta tablo, ĉe kies maldekstra flanko staras du seĝoj. Fone, meze pordo. Apud, dekstre, antaŭ la fona muro, seĝoj.

Kiam la kurteno leviĝas, Lernanto tenas en sia mano libron kaj iradas tien-reen. Kelkfoje suprenrigardas al la plafono. Liaj lipoj moviĝas, li provas parkeri. Post kelkaj sekundoj tra la pordo enpaŝas Zamenhof, vestita en la kutima longa, nigra jako, amelitaj manumoj kaj kolumo.

Z: Bonan tagon!

L: (leĝere, preskaŭ ne ekvidante lin) Bonan tagon!

Z: (postrigardas lin, kiu senŝanĝe iradas tien-reen, neatentante; fine ekparolas) Pardonon... pardonon... Ĉu mi ne ĝenas vin, se mi demandas ion?

L: Bonvolu nur demandi. (ekhaltas) Mi jam ne povas multe lerni. Post kelkaj minutoj komenciĝas la ekzameno. Ĉu ankaŭ vi venis al la ekzameno?

Z: Jes, sed ne por ekzameniĝi. Mi multe aŭdis pri la vigla hungara esperantista literatura vivo. Pri la Budapeŝta Skolo. Pri la gazeto «Literatura Mondo», pri la eminentaj hungaraj verkistoj kaj bonegaj lingvistoj. Mi intencas propraorele aŭdi, kiel la hungaroj kultivas nian lingvon.

L: Mi tamen proponas al vi akiri hungarlandan diplomon.

Z: (ridete) Mi pensas, ke mi jam sufiĉe konas la lingvon.

L: Sed la Budapeŝta diplomo havas sur la tuta mondo grandan respekton. El multaj fandoj venas samideanoj ĉi tien por ricevi hungaran diplomon. Ĉu vi scias, ke Hungarlando havas la plej multajn diplomitajn esperantistojn?

Z: Mi gratulas.

L: De kie vi venis?

Z: El tombo.

L: Ĉu el Tombo? Kie situas tiu urbo?

Z: En Polujo.

L: La poloj estas bravaj esperantistoj. Kaj ĉu vi permesas demandi vian nomon?

Z: Ludoviko Lazaro Zamenhof.

L: Zamenhof? Ĝi estas germana nomo, ĉu ne?

Z: (surprizite) Ĉu vi ne aŭdis ankoraŭ mian nomon?

L: Mi korespondas kun multaj polaj amikoj, sed ili havas polajn nomojn.

Z: Kaj ĉu vi nun ekzameniĝos? Budapeŝte?

L: Jes. Sed bonvolu diri, kion signifas laŭvorte Zamenhof?

Z: Laŭvorte tradukite: Semkorto.

L: Ĝi sonas multe pli bele. Nia lingvo mem estas pli bela, ol ĉiuj nacilingvoj, ne?

Z: Eble vi pravas.

Ekstere la voĉoj de Profesoro 1 kaj Profesoro 2:

«Bonvolu antaŭen... Nur post vi!»

L: Venas la profesoroj! (Lernanto kaj Zamenhof retiriĝas malantaŭen)

1 kaj 2: (enpaŝas) Bonan tagon!

L kaj Z: Bonan tagon! (1 kaj 2 sidiĝas apud la tablo, sur la seĝoj)

1: Do, ni komencu la ekzamenon! (paŝas al la tablo) Pardonu samideano, sed vi estas la pli juna. Ĝentileco postulas, ke unue venu la pli aĝa kandidato. (al Zamenhof) Bonvolu veni!

Z: Pardonon, sinjoroj, sed mi ne intencas ekzameniĝi.

1: Ĉu vi jam havas diplomon?

Z: Mi... mi ankoraŭ ne havas.

1: Kaj vi scias nenion el nia lingvo?

Z: Mi ja scias. Mi parolas ĝin.

1: Kiel?

Z: Sufiĉe bone.

1: Tiam des pli ne forlasu la okazon akiri diplomon. Esperantisto sen diplomo valoras nenion!
Bonvolu sidiĝi ĉi tien!

Z: Sed mi...

1: Nenio «sed mi»! (ekstaras, iras al Zamenhof, ekkaptas lian jakon, tiras al la tablo) Vi ne konas la valoron de la budapeŝta diplomo. Ĉu vi ne aŭdis pri la bonega reputacio de la Budapeŝta Skolo? Niaj verkistoj havas la plej bonan lingvouzon.

Z: Jes, ĝuste tial mi venis, sed...

1: Kun nia diplomo vi estos ĉie respektata esperantisto. Bonvolu nur sidiĝi. (intertempe senĉese tiras lin kaj premas en la seĝon. Reiras al sia loko kaj sidiĝas. Al Lernanto) Samideano, bonvolu iom atendi, ĉu ne?

L: (indigne al Zamenhof) Ekzamenhof! (kolere foriras)

1: (prenas grandan paperfolion kaj plumon) Nomo?

Z: Ludoviko Lazaro Semkorto.

1: (skribas sur la paperfolion) ... korto. Loĝloko?

Z: Tombo.

1: (skribas) Tom/bo. Lando?

Z: Polujo.

1: (skribas. Emfaze) Po/LI/o.

Z: Ne Polio! Polujo!

1: (suprenŝovas la okulvitron) Ĉu VI instruas min, aŭ MI instruas vin?

2: (tro afabla kaj aplomba) Ni haltu iome! Polujo estas iom arkaiĝinta vorto. Ĉe ni oni nomas ĝin Polio, aŭ Pol/Ian/do. Ĉi lasta estas la plej oficiala kaj Zamenhofa formo.

Z: Mi ne sciis.

2: Ne gravas, karulo. Kontraŭ komencantoj ni ne estas severaj.

1: Naskiĝjaro?

Z: Mi estis naskata je dekkvina decembro en mil okcent kvindek naŭ.

1: (konsternite) Ki...el?

Z: En mil okcent kvindek naŭ. Ne miru. Mi estas iom maljuna, sed mi diris, ke mi venis el tombo.

1: (frapetadas la tablon per la kraĵono) Min ne interesas, kiom maljuna vi estas, sed vi diris eĉ aliajn vortojn, tre malkorekte. Vi diris: «Mi estis...» Nu?

Z: Ho jes. Mi estis naskata.

1 kaj 2: (konsternite alrigardas unu la alian)

1: Ĉu nas/KATA?

Z: Jes. Tiam komenciĝis mia vivo.

1: Sed ĉu nas/KATA?

Z: Jes. Ne edziĝanta, ne mortanta, sed naskata.

1: (manplate kovras siajn orelojn) Ĉu edzi/ĜANTA, mor/TANTA?

Z: (embarase) Ne. Naskata. (1 kaj 2 kunrigardas)

2: Ĉi tio jam estas granda eraro, kara. Ĉu via patrino naskis vin dum la tuta jaro?

Z: Mi ne komprenas la demandon.

1: Ĉu vi estas atisto?

Z: Ki...isto?

1: Atisto!

Z: Kio estas tio?

1: La plej kontraŭzamenhofa tendenco. Eksciu, ke viaj vortoj estas tute kontraŭzamenhofaj.

Z: Mi ne sciis.

1: Bedaŭrinde. Zamenhof mem skribis: «Mi estis nas/KITA en mil okcent kvindek naŭ».

Z: (ekvigle) Ho, mi jam komprenas! Je la komenco de mia naskiĝjaro mi estis nas/KOTA, dum la jarfino mi estis nas/KITA, sed je la dekkvina de decembro mi estis nas/KATA. Ĉu ne?

1: (frapas la tablon) Terure! Se vi estas atisto, vi ne venu Budapeŝton por ekzameniĝi. Tio ĉi estas jam ne eraro, sed krimo!

2: (ekkaptas la brakon de 1) Ne tiel laŭte! Eble sinjoro akademiano Stop Bowitz sidas ĉi tie!

1: (suprenŝovas la okulvitron, explore rigardas la spektantaron) Bone. (al Zamenhof) Sed vi ne faru pluajn similajn kontraŭzamenhofajn erarojn.

Z: Mi petas pardonon.

1: Komprenu fine: vi neniam estis «nas/KATA».

Z: Kaj kiel mi tamen estiĝis?

1: Komprenu: ĈI TIE, en Budapeŝto vi ne povis esti nas/KATA.

Z: Mi ne estis naskata en Budapeŝto.

1: Do, eĉ ne estu!

Z: Verŝajne, mi eĉ ne estos. Mi promesas.

1: Nu, ni komencu la ekzamenon. Ni prenu kelkajn gramatikajn demandojn: ĉu infinitivo povas funkcii kiel adjekto?

Z: E...eble.

1: Kial «eble»? Ĉu vi scias, aŭ ne?

Z: Mi ankoraŭ ne pensadis pri tio.

1: Domaĝe. Nu, mi helpas: jes, infinitivo povas funkcii kiel adjekto. Dumaniere. Bonvolu nomi la manierojn! (Zamenhof silentas) Ĝi povas esti rekta aŭ nereкта. Ĉu ne?

Z: Verŝajne.

1: Kial «verŝajne»? Ĉu jes, aŭ ne?

Z: Se vi asertas, tiam nepre.

1: Bonvolu diri, kia estas la nereкта infinitiva adjektivo?

Z: (pensante, iome kolere) Eble... eble... kurba infinitiva adjektivo. (1 kaj 2 ŝokite kunrigardas)

1: Terure! Nu, mi diras al vi ekzemplan frazon: «Li faras nenion, krom turmenti min».

Z: (ekflagre) Ĝuste la saman mi volis diri!

1: Sed vi ne diris.

Z: (ridete) Mi ne kuraĝis.

1: Konfesu, ke vi ne sciis.

Z: Sed mi jam scias. Perfekte.

1: Vi ne diru «perfekte», ĉar perfekte estas tute alia gramatika koncepto. Tio signifas la finitan aspekton de la verbo. Ekzemple: «Mi plenŝtopis mian cerbon per sss...» Nu? Per stu... stu...

Z: Stultaĵoj!

1: (frapas la tablon) Studoj! Do, en tiu ĉi frazo «plen» signifas la plenumitecon. Alia ekzemplo: «Mi ellegis la libron». Ĉu vi ankaŭ povus diri perfektan frazon kun alia vorteto, simile al «plen» kaj «el»?

Z: Jes. Ekzemple: «Mi finlegis la libron».

1: (ektime) Kion vi diris?

Z: Mi finlegis la libron.

1: St! St! (ĉirkaŭrigardas la spektantaron. Al Zamenhof flustre) Eble sinjoro akademiano Kalocsay povas sidi inter la spektantoj!

Z: Ĉu li estas idisto?

1: Ne. IT/isto!

Z: Ĉu eĉ pli danĝera? (1 mansvinge signas, ke estas pli danĝera) Ĉu nova lingvoprojekto?

1: Tute ne! La plej Zamenhofa tendenco. Zamenhof estis pura itisto.

Z: (ŝultrolevante) Mi ne sciis.

1: Ni ne flankiĝu. Diru al mi: kion havas la verboj?

Z: Ili havas radikon kaj finaĵon.

1: Kaj krome? (Zamenhof silentas) La verboj havas dek du tempojn, tri modalojn, tri modojn, kvar voĉojn kaj kvin aspektojn. Ĉu ne?

Z: Nepre.

1: Bonvolu mencii kelkajn voĉojn!

Z: (iom pensante) Tenoro, baritono...

1: (frapante per la kraĵono) Ekzistas aktiva, pasiva, faktitiva kaj mediala voĉoj.

Z: Terure!

1: Kial?

Z: Ĉu tiom malfacila lingvo estas Esperanto? Zamenhof intencis krei facilan lingvon.

1: Ni pritraktas la lingvon je scienca nivelo. La Budapeŝta Skolo postulas altan scion. Ni estas rigoraj. Do, ni reiru al la voĉoj. Ekzemple: kion signifas la pasiva voĉo?

Z: Pasivon. Ĉu ne?

1: Ne sufiĉas. Pli precize! (Zamenhof silentas) Do, la pasiva voĉo signifas agon, kiun la subjekto suferas. Menciuj ekzemplon pri suferata ago!

Z: Ekzemple: Vi ekzamenas min.

1: Ĉi tiu estas aktiva voĉo.

Z: Sed suferplena.

1: Diru la saman pasive.

Z: Mi estas ekzamenata.

1: Nu fine! Kio estas ĉi tie la ago?

Z: Ekzameni.

1: Kaj kiu suferas?

Z: Mi.

1: Kaj kiu suferigas?

Z: (dolore) La Budapeŝta Skolo!

1: Do, mi nun transdonas la rolon al mia kolego. Li faros kelkajn demandojn el la sintakso.

2: Nu, diru sinjoro kandidato, kiel oni povas dividi la verbojn en la frazo?

Z: Mi ankoraŭ ne pensadis pri tio.

2: Al predikataj kaj ne predikataj verboj. Kiel nomiĝas la nepredikata verbo? (Zamenhof silentas) Predikativo! Kia povas esti la predikativo? (Zamenhof silentas) Ĝi povas esti adjektiva kaj substantiva. Ekzemple: «Budapeŝto estas nia kara urbo». Ĉu ne?

Z: Vere kara. Mi konstatis.

2: Do, diru al mi: en vortkunmetoj la ĉefelemento kiel efikas al la flankelemento? Unue per adverbigo. Kaj due? (Zamenhof silentas) Per adjektivigo. Ĉu vi povas diri ekzemplon? (Zamenhof silentas) Nu, ekzemple: «satmanĝi».

Z: «Satmanĝi»? Ĉu en Budapeŝto?

2: Nu, bedaŭrinde, vi eĉ unusolan demandon ne povis respondi. Mi jam ne scias, kion demandi... Bonvolu diri, kion vi entute scias?

Z: Mi povas paroli.

2: Nu, ni ekzamenu. Bonvolu al mi respondi, sed per kompleta frazo; kion mi faras? (per kraĵono imitas skribadon) Nu... La profesoro..

Z: La profesoro...

1: NU? La profesoro... sss...

Z: (subite) Siblas!

1: Nu ne! Kion mi nun faras? (imitas la skribadon) Per mia mano! La profesoro sss...

Z: Svingadas la krajonon!

1: Damne! Kion mi faras? Sss...

Z: Strečas!

1: (surprize) Kion mi strečas?

Z: Miajn nervojn.

1: Do, ni finis la ekzamenon. (al 2) Sinjoro kolego, kiel vi opinias pri la kapablo de sinjoro Semkorto?

2: Li scias nenion.

1: Vere nenion. Do, ni donu al li diplomon, ĉu ne?

2: Memkompreneble.

1: (ekstaras, kune kun 2) Nu, kara sinjoro Semkorto, vi ekzameniĝis sukcese kaj nun akceptu nian diplomon. (prenas la grandan paperfolion kaj transdonas)

Z: Ĉu ĝi jam estas preta?

1: Antaŭ dek minutoj mi skribis viajn personajn indikojn sur la diplomon. Vi mem vidis.

Z: Ĉu jam antaŭ la ekzameno?

1: Jes. Ni ne kutimas perdadi la tempon.

Z: Sed mi ne povis respondi al unusola demando kaj vi diris, ke la ekzameno estas rigora.

2: Ĉu por vi ĝi ne estis sufiĉe rigora?

Z: Kaj tamen mi ricevas diplomon?

1: Vi taŭgis por niaj pretendoj. Vi sciis tiom, kiom la ceteraj. Kaj ni devas plenumi nian ĉijaran edukplanon. Ne forgesu, ke ni, hungaroj, havas la plej multajn diplomitajn esperantistojn.

Z: Kaj kio okazus, se mi estus bone respondinta al viaj demandoj?

1: (demandeme rigardas al 2, kiu levas la ŝultron, poste iom meditante al Zamenhof) Nu, tiaspeca okazo ankoraŭ ne troviĝis, sed ni verŝajne eĉ tiam donus diplomon.

(1968)

/Sendis s-ino Liette Lêla kaj s-ro Josenilton el Brazilo. „Tiu satiro troveblas en la listo de la Rakontoj de **Sándor Szathmári**, en lia vikipedia biografio (http://eo.wikipedia.org/wiki/S%C3%A1ndor_Szathm%C3%A1ri).” Sinjoro Josenilton „trovis ĝin ne en libro, sed sur la suba finnlanda paĝo, kie la aŭtoro mem komentarias pri ĝi: <http://laine.pp.fi/ef/ef682.html>

Bondeziroj

Membraro de la Esperanto Amika Rondo „Király Lajos” de Miskolc deziras agrablajn jarfinajn festojn kaj senprobleman pacan prosperan novan jaron al niaj kunlaborantaj laborkunuloj (D-ro Ivan Bujdoŝo, Jozefo Cziboly, Jindřiška Drahotová, d-ro Andreo Dudich, Lubomir Fajth, Helena Böde, Istvan Sutka, Tibor Szabadi, Johano Nagy, Teodoro Andreas kaj Valentin Melnikov) iliaj familioj kaj al la karaj legantoj.



http://www.google.hu/imgres?imgurl=http://www.tuzijatekvasar.hu/images/stories/tuzijatek_2_n.jpg



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>